

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Aŭtuna diplomatia
ofensivo de UEA

La neforgesebla
ARKONES

Malkovru Esperanton!

Nia movado bezonas
sciencan esploradon

Abiturienta atesto de la
gimnazio Zamenhof

Bezono kaj neceso de
Zamenhof-bibliografio

Herta Müller ricevis la
Nobel-premion pri
literaturo en 2009

Tri recenzoj

“Literatura Foiro” en la
rubriko “Nia Trezoro”

23. VI. 1914.

D^{ro} L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

Kara Sinjoro!

Vian leteron de 16/VI mi danke ricevis.
La aferon ni povas rigardi kiel aranĝitan.
La kondiĉojn, kiujn Vi proponas, mi akceptas.


Ĉar mi ne deziras fari al Vi ian malfacilaĵon ĉe la traktado kun la Biblia Societo, tial mi fordonas al la Societo mian tradukon plene; la rajton, ke mi povu eldoni ankaŭ mem, mi ne rezervas al mi.

Al pastro Rust mi donas plenan rajton fari en mia traduko ĉiujn ŝanĝojn, kiujn li trovos necesaj aŭ utilaj, sed kun la kondiĉo, ke tio estu farata ne sub mia nomo.

La pluajn partojn de la Biblio mi tradukos, kaj mi esperas fini ĉion en la daŭro de 2 jaroj.

Volu sciigi min, al kiu mi devas sendi la ĝis nun tradukitajn partojn: al Vi, aŭ al s-ro Rust, aŭ al Fraŭlinoj Peckover? Tuj post la ricevo de Via sciigo mi sendos.

Via



2009

11

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №11 (181)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 23a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2009, №11 (181).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 октября 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

Andy foriris sed Renato restas

En la retlisto [uea-membroj](#), kiu laŭnome estas rezervita nur por membroj de UEA, svarmis mesaĝoj dum la pasintaj monatoj. Pinto estis en junio kun 607 mesaĝoj; po 20 tage. Tiu diskutemo ne estis iniciatita de la estraro, sed kaŭzis ĝin unusola membro, la sviso Andy Künzli.

Li ne estas kiu ajn. Sian plej grandan atingiĝon li faris kiel interlingvisto per ampleksa kaj kompetenta libreco pri la svisa planlingva movado, kiun ankaŭ UEA rekonis per grava premio. Antaŭ dudeko da jaroj li apartenis al la gvidantoj de TEJO kaj poste reprezentis longe UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Laŭ tiu fono oni jam povas konjekti, ke li konas UEA kaj la movadon bone, kaj tion konfirmis ankaŭ liaj kontribuoj en la reta diskuto, en kiu li kritikis pli-malpli ĉion imageblan en la agado de UEA kaj de la tuta movado kaj ankaŭ tiun de konkretaj korifeoj, precipe Dasgupta kaj Corsetti sed ankaŭ Tonkin kaj Fettes.

Estas tamen troige paroli pri diskuto. Apenaŭ estis aliaj, kiuj subtenis la kritikojn de Künzli aŭ rebatis ilin per kontraŭargumentoj. En vera diskuto unuopaj kontribuoj estas ĉeneroj, tra kiuj la diskuto progresas ĝis iuj konkludoj. Fine de la ĉeno la diskutantoj devus esti pli saĝaj ol en la komenco, sed en uea-membroj ne okazis tiel. Je unua vido pri tio kulpas Künzli mem, kiu tro facile falis en ekscese malĝentilan kaj insultan lingvaĵon, kiun aliaj ne povis digesti. Ne malofte oni proponis elĵeti lin el la listo, kio fine ne bezonis okazi, ĉar Künzli mem ekŝiĝis. Krom forlasi la retan forumon li ankaŭ anoncis, ke li ne renovigos sian membrecon en UEA. Kelkaj ne povis kaŝi sian jubilon pri tiu anonco, kvankam Buller klopodis bridi ilin memorigante, ke UEA ne havas tro da membroj.

Künzli fuŝis per la elekto de la lingvaĵo, sed pri la manko de diskuto malgraŭ rekorda nombro da intervenoj ne kulpas li sola. Kial saĝaj movadanoj ne povis ignori la ekscesojn de lia stilo kaj vidi tra ĝi la enhavon? Laŭ Künzli saĝaj movadanoj ne plu ekzistas, sed se jes, ili perdis okazon pruvi al la kolera sviso sian ekziston. Verŝajne sobra rezonado estus influinta lian stilon mildige kaj savinta unu anon, eĉ se ne animon por UEA en 2010. Pri la sincereco de liaj celoj ni ne dubas.

Elreviga estis la nevidebleco de la estraranoj de UEA, nekompetentaj laŭ Künzli, precipe Dasgupta, Nourmont kaj Pietrzak. Kial ili ne turnis la disputon en diskuton pri nova laborplano, kiun oni devos akcepti en Havano, sed pri kiu mankas ankoraŭ ĉiu spuro? Ĉiam pli evidentiĝas, ke la estraro ne gvidas la asocion. Ne nur al eksterulo aspektas, ke gvidas ĝin Corsetti. Ke li svingiĝas ĉie, verŝajne ne rezultas el forgeso, ke de du jaroj li ne estas prezidanto. Ĉar ne gvidas tiuj, kiuj devus, en la vakuo aperis Corsetti. Se la elekto-komisiono, kiun gvidas Corsetti, reproponos saman estraron, Corsetti gvidos UEA ankaŭ post Havano. En 2001 Buller demisiis, ĉar Corsetti estis elektita. Naŭ jarojn poste li povos konstati, ke por havi Corsetti ne necesas elekti lin.

Komitatano Z

Sur la kovrilpaĝo estas letero de Zamenhof, kiun al ni sendis Reinhard Hauptenthal kiel ilustraĵon por sia artikolo pri la Zamenhof-bibliografio (*vd.* p. 14).

Aŭtuna diplomatiado de UEA

Sesmembra delegitaro de UEA partoprenis la **62an Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj**, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj okazigis en Meksik-urbo 9–11 sep kun la temo “Por paco kaj evoluo: Malarmu nun!”. Partoprenis ĉ. 1300 delegitoj de pli ol 340 NRO-j el pli ol 50 landoj. La gravecon, kiun UN donis al la konferenco, ilustras, ke la malferman paroladon faris Ban Ki-moon, la ĝenerala sekretario de la monda organizaĵo.

Ĉiu NRO kun oficiala statuso ĉe UN, rajtas sendi kvin delegitojn, sed se unu delegito estas 18–24-jara, la maksimumo estas ses. UEA plenumis tiun ĉi postulon kaj ĝia delegitaro konsistis el Neil Blonstein, Martha Cárdenas, Malley Martínez Mateos, Daniel Moreno, Martin Schäffer kaj la junulara delegito David López Rueda.

La teamo de UEA distribuis informfoliojn — krom ĝeneralaj informiloj pri Esperanto la foliojn *La pozicio de UEA pri lingvaj rajtoj* kaj *Praga Manifesto* — kaj havis interparolojn kun aliaj delegitoj, kun multaj volontuloj de la konferenco kaj kun lokaj journalistoj. Martin Schäffer taksas, ke personaj konversacioj okazis kun pli ol 400 konferencanoj.

Reprezentanto de UEA kaj de ties nova ekzamsistemo laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), Zsófia Kóródy, partoprenis en **komuna konferenco de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) kaj Goethe-Instituto** (18–19 sep, Berlino). La konferenco okazis kadre de la programo “Lingvoj sen limoj” kun la ĉeftemo “Lingvo kaj integriĝo”.

UEA, aligita membro de ALTE, krom spertiĝi en konferencoj kaj kunsidoj, aktive partoprenas en la laboro de la specialaj interesgrupoj (SIG) de ALTE. Jam antaŭ la konferenco Zsófia Kóródy ricevis dankvortojn de la ALTE-sekretario pro la kontribuo al la finredakto de la nova praktika *Manlibro por testprikaj ekzamenado*. Laŭdinda estas la laboro de Gerald Tucker, fakestro por ekzamenadoj de Germana Esperanto-Instituto (GEI), kiu kompetente trarigardis kaj plibonigis la 126-paĝan manuskripton kaj sendis komentojn al la koncerna SIG. Krom helpi al ALTE en la preparado de tiu grava libro, UEA mem profitas el la laboro. Tucker jam de pli ol jaro sin dediĉas al la akordigo de la ekzamenadoj de GEI kun la postularo de KER en la niveloj A1 kaj A2.

Dum la konferenco en Berlino Zsófia Kóródy havis la okazon paroli kun

ALTE-kunlaborantoj pri la ekzamenregularo por blindaj esperantistoj, kiun aprobis la komitatoj de ILEI kaj UEA en julio 2009. Ŝi informis ilin ankaŭ pri la bonaj rezultoj de la unuaj naŭ monatoj de la KER-ekzamenadoj de UEA — jam kun ĉ. 100 ekzamenitoj — kaj prezentis la libron *Esperanto de nivelo al nivelo*, kiu enhavas modelajn testojn laŭ KER.

6 okt okazis en Parizo la inaŭguro de la **35a Ĝenerala Konferenco de Unesko**, kiu daŭros ĝis 23 okt. Tiu ĉi supera organo de la organizaĵo kunvenas ĉiun duan jaron kunigante reprezentantojn de la 193 membroj-ŝtatoj por difini la politikon kaj agadprogramojn de Unesko.

Ses personoj reprezentas la mondan esperantistaron en la konferenco. Pro siaj oficialaj rilatoj kun Unesko, UEA estas aŭtomate rajtigita partopreni la Ĝeneralan Konferencon kiel observanto. Nome de UEA ĉeestas Renée Triolle, Barbara Despiney kaj Estelle Loiseau. Unesko invitis ankaŭ Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj, kun kiu ĝi daŭrigas rilatojn sur neformala bazo. ILEI delegis Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet kaj François Lo Jacomo.

La plej grava decido de la nuna konferenco estis la elekto de nova ĝenerala direktoro anstataŭ la japana diplomato Koïchiro Matsuura. Unesko estos unuafoje gvidata de virino, ambasadorino Irina Bokova el Bulgario, elektita 15 okt.

La prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, gratulis la novan ĝeneralan direktoron de Unesko, tuj post ŝia elekto.

“Ni estas malnovaj amikoj”, — skribis Dasgupta en sia mesaĝo. Li klarigis, ke jam en 1954 Unesko starigis konsultajn rilatojn kun UEA kaj samjare en Montevideo ĝia Ĝenerala Konferenco akceptis rezolucion favoran al Esperanto. “Sojle de la centjariĝo de Esperanto, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis en Sofio en 1985 duan rezolucion, kiu ebligis al ni pli proksiman kunlaboron kun Unesko en la rapide ŝanĝiĝanta tutmonda kunteksto”, — Dasgupta aldonis altirante la atenton de Bokova al la speciala loko de la bulgara ĉefurbo en la historio de la rilato inter la du mondaj organizaĵoj. “Nia komuna interesiĝo pri la konservado de lingva kaj kultura diverseco kaj pri la kreado de leĝaj formoj al la ideo de lingvaj homaj rajtoj, faras el tio ĉi gravan rilaton — malmultaj NRO-j estas aktivaj en tiu ĉi kampo”, — skribis Dasgupta, finante per la certigo de UEA daŭre kunlabori kun Unesko pri komunaj temoj.

Meksikurbo. La organizantoj invitis la partoprenantojn al pacmarŝo. Pluraj partoprenantoj sekvis la alvokon kaj promenis kun sloganoj tra la parko La Alameda. La promenadon partoprenis ankaŭ Esperanto-reprezentantoj kun sloganrubando (en la angla) “Esperanto — por internacia amikeco”. (*Fotis Martin Schäffer*)



GK UEA

UK-95: KKS laborvizitis Kubon

Clay Magalhães, la Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA, 6–12 sep vizitis Kubon lige kun la preparlaboroj de la 95a Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17–24 jul 2010).

Magalhães vizitis la kongresejon, kies perfektan taŭgecon spertis jam la kongresanoj de la 75a UK en Havano en 1990. Estis pluraj renkontiĝoj kun la Loka Kongresa Komitato kaj aliaj lokaj organizantoj, turismaj kaj kulturaj institucioj, flugkompanioj. Magalhães estis dufoje akceptita de Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, kiu plene apogas la UK-on kaj komisiis funkciulon, kiu estos en regula kontakto kun LKK por sekvi la evoluon de la kongrespreparoj.

KKS konatiĝis ankaŭ kun la lokoj de la 43a ILEI-konferenco kaj de la 66a Internacia Junulara Kongreso. La esperantistaj instruistoj kunvenos antaŭ la UK en la hotelo *Canimao* ĉe la rivero Canimar, proksime al la famaj plaĝoj de Varadero, dum TEJO kongresos tuj post la UK en la ĉemara kampadejo Los Cocos ĉ. 60 km oriente de Havano.

Okaze de la vizito la Ministerio pri Kulturo kaj Kuba Esperanto-Asocio kunvokis gazetaran konferencon. Rezultis raportoj ĉe tutlandaj radiostacioj; ankaŭ la plej legata ĵurnalo de la insulo *Granma* aperigis la novaĵon informante pri la UK kaj Esperanto. Radio Havano Kubo elsendis intervjuojn de Magalhães en la hispana kaj portugala lingvoj.

GK UEA

IJK: kie en 2011?

Kandidatiĝu por organizi la 67an Internacian Junularan Kongreson en via lando! TEJO organizos la kongreson kune kun vi. Limdato por kandidatiĝi estas la 15a de decembro 2009.

Kion TEJO faros?

- preparos kun vi buĝeton,
 - varbos por la evento,
 - provizos retpaĝaron, aliĝsistemon, datenbazon, tasklistojn, vikion,
 - helpos pri subvencipetado.
- Kion via teamo faros?
- trovos kaj traktos kun ejoj,
 - preparos la programon,
 - surloke organizos,
 - librotenos,
 - traktos invitleterojn,
 - traktos lokajn kontaktojn,
 - metas informojn en la paĝaron.

Por pliaj informoj kontaktu [lukasz@tejo.org](mailto:lukaszk@tejo.org)

Lukasz Żebrowski



En la brazila Senato

Komisiono pri edukado de la Brazila Senato 15 sep aprobis leĝprojekton, proponitan de senatano Cristovam Buarque, kiu permesos/instigos la instruadon de Esperanto en mezlernejoj, laŭ deziro de lerneja komunumo.

La novaĵ-agentejo de la Senato disvastigis informon, kiu reliefigas la favoran voĉdonon pri la projekto de Buarque, laŭ kiu Esperanto “povas signifi instigon al paco inter la landoj”.

La informo diras, ke en la komisiono kontraŭ la enkonduko de Esperanto voĉdonis senatanoj Gerson Camata (el Spirito Santo, kies guberniestro li estis) kaj Roberto Cavalcanti (entreprenisto el Paraíba). Laŭ Camata, temas pri “senutila projekto”, ĉar tiu, kiu lernos Esperanton ne havos aliajn parolantojn por kunpraktiki la novan lingvon.

La projekton oni direktos al la Deputita Ĉambro de la Senato por diskuto kaj voĉdono.

James Rezende Piton

Unu Mondo

Post la partopreno en la Eŭropaj Balotoj 2009, kelkaj germanaj aktivuloj de Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) proponis pluevoluigi la asocion EDE al tutmonda partio. Ili atentigas, ke Esperanto estas unuavice lingvo por la tuta mondo, kaj ke ĝuste ekster Eŭropo plej gravas agadi por egalrajta kunlaboro, daŭripova evoluo, homaj rajtoj kaj demokratio.

Kiel la unua paŝo, fondiĝis la reta forumo “Unu Mondo” ĉe Googlegroups, al kiu aliĝis jam 40 membroj. Laŭ aktuala plano, Unu Mondo fondiĝos post nelonge kiel aparta partio, kiu tamen intencas amike kunlabori kun EDE kaj ne rekte konkurenci al ĝi. Unu Mondo intencas partopreni en balotoj ĉie ajn en la mondo, laŭokaze ankaŭ sur regiona kaj loka nivelo, por realigi la devizon “pensu tutmonde — agu loke” de la Agendo 21. Pliaj informoj troviĝas en la retejo <http://www.unu-mondo.org>.

Ulrich Matthias

Esperanto en ... Okcidenta Saharo

(Landa Agado) Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU) kunlabore kun UJSARIO (Junulara Sekcio de la fronto Polisario — reprezentanto de la popolo de Okcidenta Saharo okupita de Maroko) helpas la ekdisvastigon de Esperanto en la rifuĝintaj kampadejoj de la saharaj zonoj ne kontrolataj de Maroko kaj apudaj zonoj en Alĝerio.

AEU altiris la atenton de altranga membro de UJSARIO kiu eklernas Esperanton. Ni havigas al UJSARIO dekon da lernolibroj kaj vortaroj en la araba lingvo por provizi la kulturajn centrojn de la kampadejoj per tiuj lerniloj.

AEU ricevis invitilon por ĉeesti la kongreson de UJSARIO en Ausserd (5–7 dec 2009).

José María Rodríguez Hernández

Partnerurbaj kontaktoj

Post la “faciligo” de la viza reĝimo inter Ruslando kaj EU (2007) la esperantista vivo en Kaliningrado malvigliĝis, ĉar ĉi tien ĉesis veni Pollandaj esperantistoj, kiuj dum kelkaj jaroj amase partoprenis esperantistajn kunvenojn en la plej okcidenta Ruslanda regiono.

Feliĉe, danke al invitiloj de la Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU) pollandaj esperantistoj denove ekricevas senpagajn vizojn.

9–11 okt grupo da esperantistoj el Pollando venis al Kaliningrado por ligi kontaktojn inter la esperantistoj de la partnerurbaj: Gdynia kaj Kaliningrado. En trihora kunveno oni interŝanĝis spertojn pri la publik-utila uzo de Esperanto. Ekzemple, KREU kelkfoje peris kontaktojn de la marista kulturdomo kun pollandaj artaj kolektivoj, kiuj koncertis en Kaliningrado. Urszula Wiczorek rakontis pri la agado en Gdynia: esperantigo de la turisma mapo kaj de la urba retejo, kunlaboro kun la EK *Kastelo* el Malbork en efektivaĵo de ĉi-jara Postkongreso. Oni decidis plu flegi kontaktojn inter la esperantistoj de la du urboj kaj fari reciprokajn grup-vizitojn.

Por plimulto de la gastoj ĉi tiu vizito estis la unua vizito ne nur al Kaliningrado, sed ankaŭ al Ruslando. En la muzeo de sukceso ili konatiĝis kun la historio de la “suna ŝtono” kaj belaj artaĵoj el ĝi. La muzeo *Friedlanda Pordego* per la virtuala ekskurso (bildo kaj sonoj) promeniĝis ilin tra stratoj de la iama Kenigsbergo. Estis vizititaj la Katedralo kun la tombo de Kantio kaj aliaj vidindaĵoj.

Halina Gorecka

Duobla sesio en UAM

Ora pola aŭtuno akceptis la partoprenantojn de la interlingvistika sesio kaj de la instruista trejnado en UAM, Poznano. La 3a semestro de la trijara studado (12–18 sep) ofertis interesan programon kun elstaraj prelegantoj: pri interlingvistiko Vera Barandovská, pri esperanta literaturo István Ertl, pri esperanta gramatiko Probal Dasgupta, pri ĝenerala lingvistiko Michael Farris. Prof. Dasgupta renkontiĝis kun aliaj kolegoj en la Lingvistika Instituto de UAM.

La unua sesio de la unujara instruista trejnado (komuna entrepreno de UAM kaj ILEI) okazis paralele — sed ebligante parte sperti la suprajn kursojn — sub la sindediĉa gvido de Katalin Kováts kun la kontribuo de Ilona Koutny. Naŭ partoprenantoj el ok landoj estis iniciataj al la praktiko de instruista profesio. Ili povis konsulti abundan instrumaterialon kaj provi la teknikojn. La lastan tagon okazis KER-ekzameno, al kiu aliĝis dek personoj (kvin el la instruista trejngrupo).

Ilona Koutny

Konferenco en Esperanto-muzeo

Ĉeĥa Esperanto-Konferenco okazis 9–11 okt 2009 en Svitavy, en Ottendorfer-domo, kie troviĝas la Esperanto-muzeo. En salonego super la muzeo estis inaŭgurita ne nur la konferenco, sed ankaŭ nova ekspozicio “Esperanto kaj fervojo” kaj anoncitaj premiitoj de infana konkurso je la sama temo. Du knaboj de la loka infana grupo tralegis premiitajn poemetojn kaj kantis du kantojn en Esperanto. Ladislav Kovář prelegis pri IFEF, poste ĉiuj iris en la muzeon por rigardi la ekspozicion mem. Vespere ili kolektiĝis denove en la salonego por spekti teatraĵon pri Zamenhof, prezentitan de Georgo Handzlik, kiu poste kantis kelkajn kantojn proprajn kaj de la ĉeĥa kantisto Jarek Nohavica.

Sabate matene realiĝis la konferenca traktado kun raportoj pri la asociaj agado kaj financo. Posttagmeze sekvis kurseto pri la interreto, la junularo prezentis sian IJK en Liberec, parto de la konferencanoj promenis tra la urbo.

Vespere en la kulturdomo *Fabrika* kantisto Miroslav Smyčka kaj violonisto Jan Duda prezentis koncerton, sekvis dancado kaj tombolo. Dimanĉe oni diskutis pri planoj de la asocio.

Partoprenis ĉ. cent personoj, la traktadon salutis persone la urbestro de Svitavy.

Miroslav Malovec




ARKONES jubileas

Kvankam multaj pollandaj aktivuloj ĉi-jare elspezis siajn ŝparaĵojn por partopreno en la Bjalistoka UK, ARKONES denove logis ducenton da partoprenantoj kaj konfirmiĝis kiel la plej amasa kaj interesa semajnfina esperantista renkontiĝo en la Orienta Eŭropo.

La partoprenantoj, venintaj el dudek landoj al Poznano por unu semajnfino (18–20 sep), havis malfacilan elekton inter paralelaj programeroj de la jubileaj, jam la 25aj **Artaj Konfrontoj en Esperanto**. Entute la programo enhavis pli ol kvindek prelegojn, koncertojn, prezentojn, spektaklojn, laborgrupojn, diskutojn, konkursojn, ktp.

La sekreto de l' populareco estas bone konata: la altnivela kultur-kleriga programo allogas multajn partoprenantojn, kiuj venas ne por studi la lingvon aŭ palavri pri la organizaj aferoj, sed por intelekto riĉiĝi kaj por ĝui la Esperantan arton; kaj tia publiko siavice altiras tiujn, kiuj volas lanĉi siajn novajn projektojn aŭ diskonigi la rezultojn de la projektoj anoncitaj. (Ankaŭ ĉi-foje estis anoncitaj la ricevintoj de la statuetoj de *Spegulo* kaj de la laŭreatoj de la Tutpollanda

Glebo Malcev en Poznano. (Fotis AIKo)



Esperanta Plebiscito, kiun prizorgas Marian Zdankowski.)

Ĉar la plena listo de la programeroj okupus la tutan paĝon, mi ankaŭ ĉi-foje mencias nenium el la prelegoj kaj laborgrupoj. Sed ja temas pri *Artaj konfrontoj*, kaj estas mencendaj la plej gravaj artaj prezentoj.

Ĉi-jare la teatra programo estis ne malpli abunda ol la muzika. La profesia trupo *Terminus A Quo*, kiun multaj povis spekti en Bjalistoko, prezentis en la kongreseja korto la spektaklon *Kanoj*. La amatora teatra Esperanto-Studio *Improviso* el Jalto (Krimo, Ukrainio) proponis kelkajn skeĉojn. Tradicie, teatraĵon surscenigis la neripetebla sveda poeto Jarlo Martelmonto. La Zamenhofa jaro donis temon al la solspektakloj *Doktoro Esperanto* de Mario Miglucci kaj *Ludoviko-Lazaro* de Georgo Handzlik.



Jefim Zajdman kaj Georgo Handzlik havas multon por diri unu al la alia kaj al la publiko en ARKONES. (Fotis Maria Mickle)

Sed la kerno de ARKONES estas muziko. La legenda Martin Wiese plenumis kantojn baladajn kaj lirik-rokajn. Unuafoje prezentiĝis sur la Poznana sceno *Iniacialoj DC*. Ne estas penseble, ke la miel-vespera koncerto okazus sen Zuzanna Kornicka, kaj ŝi kantis, kaj meritis la aplaŭdodon.

Sed la plej memorinda surscena agado estis tiu de *Piĉismo*, kiun personigis ties fondinto kaj solisto Glebo Malcev. Post jaroj da eksteresperantuja koncertado li elektis Poznanon kiel la urbon de sia (ĉu nur unufoja?) reveno al Esperantujo. La reveno konsternis tiujn, kiuj memoras lin punka kantisto, ja lia programo *Esperanto Esperanto* estis eble la premiero de la brumuziko en Esperantujo. Malmultaj ŝatas lian stilon (nois), sed ĉiuj spektintoj memoros lin en Esperantnazia uniformo, kun arĉo kaj violono enmane, kaj la disŝiritajn pecojn de iu “internacia sendependa magazino” surplanke. Tia estas ARKONES... Bunta kaj loga. Mi nepre revenos post unu jaro.

AIKo



TORPEDO trafis la celon

Kvindeko da instruistoj partoprenis 9–12 okt en la Esperanto-urbo Herzberg la tradician Tutlandan Oktobran Renkontiĝon Pedagogian — TORPEDO.

Katalin Kováts montris modellecionojn, skizis la historion de instru-metodoj kaj informis pri la retejo edukado.net. Stefan MacGill montris situacikomunikajn lernilojn, perfekte eksplikis gramatikon — precipe la esencan rolon de verboj en Esperanto — kaj vespere amuzis ĉiujn per skeĉoj.

Zsófia Kóródy tiel vigle prezentis sian prelegon pri lerniloj, ke oni petis ŝin plilongigi ĝin. Stefanie kaj Gerald Tucker el la Germana Esperanto-Instituto raportis pri adapto de la germana ekzamen-sistemo al la Komuna Eŭropa Referencakadro. Peter Zilvar parolis pri andragogio (instruado al adoltoj), historio kaj kulturo de Esperanto, varbado. Stanisław Mandrak prezentis la rektmetodan kurson de Stano Marček.

Lidia Ligeza kaj Adam Łomnicki arte parolis pri “Klerigado de E-instruistoj (arto de tradukado)”. Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus prezentis projektojn de la grupo E@I.

Halina Komar donis bazajn informojn pri la projekto Grundtvig. Kelkaj partoprenantoj de tiu projekto (kadre de la EU-programo “Dumviva Lernado”) el Pollando kaj Slovakio restis plian semajnon en la pitoreska Sieber apud Herzberg por intensa kurso de instruista trejnado.

Malgosia Komarnicka

KEKSO: ĉu duona, aŭ duobla?

La 8a KEKSO okazis 25–27 sep en Dessau kun dudeko da junaj partoprenantoj el la tuta Germanio.

La organizado de KEKSO kvazaŭ aŭtomatiĝis: Leo Sakaguchi zorgas pri junulargastejo kaj varbas. André Müller kaj Liesa-Marie Alfier helpas kaj gvidas Esperanto-kursojn dum la renkontiĝo.

Sed ĉi-foje pro la kunlaboro de KEKSO kaj Was-Bewegen e.V. (Germana asocio por junulaj eventoj) pli da homoj aktivis en la organizado. Kune ni preparis ĝin, kaj dank’ al la subvencio de Was Bewegung (la organizanto de “Startschuss Weltverbessern”), ni mendis pli da lernolibroj kaj varbiloj; eĉ la kotizoj fariĝis tre malaltaj.

Ankaŭ surloke ni provis bone kunlabori kaj kunigi la du programojn: Partoprenantoj de “Startschuss Weltverbessern” vizitis nian bazan kurson kaj poste sukcesis prezenti sin Esperante. Kelkaj KEKSuloj lernis pri fotografio, jogo, aŭ dancado. La tuta grupo tre ĝuis la frenezan “Trash-Theater”.

Ĉi tiu KEKSO estis nekutima. Jen la demando: Ĉu la dividita KEKSO estas duona KEKSO aŭ duobla KEKSO?

Liesa-Marie Alfier, André Müller, Leo Sakaguchi

MES: tro populara

Jam la pasint-jara kvara Mozellanda Esperanto-Semajnfino (MES) ne estis malmulte vizitata, sed por la nunjara, kvina MES aliĝis pli ol ni povas akcepti en la seminariejo.

La regiona renkontiĝo de Rejnland-Palatinata landa ligo okazis 25–27 sep denove sur Marienburg apud Zell/Mozelo. Jam unu semajnon antaŭ la renkontiĝo videblis, ke la menditaj litoj ne sufiĉos, kaj la malfruaj aliĝintoj devis loĝi en hotelo en la apuda urbeto Zell.

La 5a MES okazis ne nur en la kutima kunlaboro kun la Luksemburga Esperanto-Asocio, sed ĉi-foje ankaŭ kunlabore kun BAVELO kaj la Orientfranca Esperanto-Asocio. La 5a MES samtempe estas la 66a regiona staĝo de Espéranto France-Est. Tio kaŭzis, ke el la 45 partoprenantoj preskaŭ duono venis el eksterlando.

Kurson A por komencantoj instruis kiel kutime Martin Brüggemeier. Kurson B por progresantoj estris Edmilson Lina Serejo, brazildevena kursestro el Aalen. Josef Schiffer prelegis pri la temo “Kiel paroligi lernantojn uzante lernolibrojn”. Svetlana Dercks-Milano-vič kun sia edzo Johann Dercks el Nederlando raportis per lumbildoj pri la vivo kaj Esperanto en Burundo. Kial la nomon de tiu lando oni skribu sen “i” klarigis antaŭe Johann Dercks en sia prelego “Pri landnomoj”. Dirk Hartmann montris fotojn pri Kaiserlautern invitante al la venontjara franca-germana kongreso en tiu urbo. Laste Jean-Luc Thibias prezentis novajn Esperantolibrojn. Tradicia estis la vespera diservo kun la pastro Albrecht Kronenberger.

Sabate posttagmeze la partoprenantoj ekskursis al Kloster Machern, iama cistercia monaĥinejo apud Bernkastel. Sed la kulmino de la semajnfino estis la sabatvespero. Marc Vanden Bempt brile prelegis pri la bierkulturo el la “lando de 1000 bieroj”. La partoprenantoj ĝuegis ne nur la plej diverstipajn bierojn de Belgujo sed ankaŭ la interesajn informojn ĉirkaŭ la temo “belgaj bieroj” kaj pri biero ĝenerale. “Vere grandioza prelego. Ni vere ĝuis la vesperon”, — komentis Gisela kaj Karl-Georg Stephan, novbakitaj esperantoparolantoj el Duisburg.

La 6a MES certe okazos venontjare denove sur Marienburg. La organizantoj jam mendis pli multajn litojn kaj esperas, ke venontjare oni ne devas diri “Bedaŭrinde ni ne plu havas litojn”.

Wolfgang Bohr



Altnivela kongreso en San-Paŭlo

“Mediprotektado: unuopa kontribuo, kolektiva ĝuo” estis la ĉeftemo de la 4a Esperanto-Kongreso de la Brazilia ŝtato San-Paŭlo, kiu okazis 10–12 okt 2009 en la urbo Bauru sub la aŭspicio de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj Esperanto-Societo de Bauru, kun valora apogo de la eldonejo *Oportuno* kaj de la Centro Hermes de Educação Superior (kies direktoro, Dina L. Andreani, estas aktiva loka esperantistino).

La kongreson partoprenis ĉirkaŭ 110 gesamideanoj el ses brazilaj ŝtatoj. La solena malfermo okazis ĉe Domo de Advokatoj, kun la ĉeesto de reprezentanto de la urbaj aŭtoritatoj, Rodrigo A.A. Mendonça, kiu parolis pri la temo “Mediprotektado”. Post la malfermo, oni aŭskultis gitarkoncerton kaj kortsuŝan prezenton de la junula koruso UNIMED, kiu ravis la publikon.

Dum la sekvaj tagoj la kongresanoj povis elekti inter fulma kurso de Esperanto kaj pluraj prelegoj: “Rakontoj de Machado de Assis” (F.S.Wechsler), “Meteologio: bazaj principoj pri vetero kaj klimato” (E.A.Oliveira), “Kiel diri?..” (P.S.Viana), “Kuriozaĵoj pri la tupa lingvo” (Osmar S Alves), “Iom pri mnemoniko” (Rogério F. Santos), “Meditado: bazaj principoj por tujza uzado” (E.S.Lima), “Teorio pri Gajo, la vivanta planedo” (Luiz G.S.Jardim), “La homo kaj la rido” (J.M.Progiant), “Sukcesa enrigardo en molekulojn — la brazila sinkrotono” (J.Piton), “La Eseraro de Waringhien” (F.Pessoa), “Vortaroj kaj lingvo” (G.Mattos) kaj “Internacia Amikeco” (I.O.Piton). Alexandre Prado prelegis por neesperantista publiko.

Sub la gvido de J.M.Progiant oni vigle diskutis pri la ĉeftemo, kun emfazo pri la komunaj trajtoj de la Esperanta kaj la mediprotekta movadoj. La organizantoj laŭdinde disdonis al ĉiuj aliĝintoj kajeron kun la tekstoj de ĉiuj prelegoj. La luksa kongresejo disponigis senpagajn komputilojn kaj projekcilojn en ĉiuj ĉambroj, kun libera aliro al interreto. Je la dimanĉa vespero oni ĉeestis artajn prezentojn: kantojn, deklamadon kaj orientajn dancojn. Konstante funkciis bona libroservo kaj budoj por vendado de Esperanto-ĉemizoj.

Dum la ferma kunsido oni spektis belan filmon pri la urbo Bauru kaj omaĝis la forpasintajn gesamideanojn. Oni elektis la urbon Piracicaba por la 5a Ŝtata Kongreso en San-Paŭlo.

Paulo Sérgio Viana

La plej verda valo en Esperantujo

20 sep okazis la 77a Renkonto de esperantistoj el la Paraíba Valo, en la kulturcentro FUNDAC en la brazila urbo Caraguatatuba (San-Paŭlo).

Post legado de la protokolo fare de Milton Serra, brile prelegis David Bianchini pri “Esperanto kaj teleinformadiko, malpli da distanco, pli da amikoj”, Pedro Cavalheiro pri “Esperanto en la laŭleĝa eduksistemo en Brazilo”, José Roberto Tenório pri “Proponoj por agigi Esperantogrupojn en la Ago-Tago”. Paulo S. Viana prezentis “guton da gramatiko”.

La tuta grupo diskutis libere pri la maniero organizi niajn regionajn renkontojn, kaj junulo Adriano Prado lude kantigis kaj dancigis la ĉeestantojn. Fine, altnivela gitaristo José Maria ludis sian muzikilon kaj prelegis pri la brazila muziko. La tuta evento plaĉis al ĉiuj pro la etoso kaj riĉa enhavo.

Paulo Sérgio Viana

150 omaĝis al la 150-jariĝo

Pli ol 150 homoj kunvenis 20 sep en la Salono de la Pioniroj en la urbodomo de Taguatinga (satelita urbo de Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo) okaze de la 12a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga (ERT) dediĉita al la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof.

Pri la ĉeftemo prelegis la instruistino Úrsula Grattapaglia, direktorino de la bienlernejo *Bona Espero*.

Kadre de la arta programo sin prezentis: gelernantoj de la Lernejo Chico Xavier kun la instruistino Maria Eurípedes de Queiróz; pedagogia skipo kaj gelernantoj de la porinfana lernejo Ludoviko Lazaro Zamenhof; kantisto kaj gitaristo Euzébio Carvalho Lopes; kantisto, komponisto kaj muzikisto Flávio Fonseca kaj la knabina kantistino Klara Fonseca.

Bauru. La librotablojn dum la tuta kongreso ĉirkaŭis legemuloj. (*Fotis Paulo S. Viana*)



La itala esperantisto Francesco Mauri, la premiito de la Oratora Konkurso de la Bjalistoka UK, prelegis pri la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, kies vicprezidanto li estas.

Ordinare ERT omaĝas iun, kiu, laŭ opinio de la Taguatinga Esperanto-Klubo, elstaris en la loka Esperanta agado. Ĉi-foje Carlos Maria ricevis Honoran Diplomon pro la konstanta apogo al la Esperanto-movado de Taguatinga kaj ĉirkaŭaĵo.

Je la aranĝo-fino, estis lotumitaj diversaj esperantaĵoj: libroj, kompaktdiskoj, kaskedoj, ĉemizoj, ktp. La 13a ERT okazos 19 sep 2010.

Correio Braziliense, la ĉefa gazeto de la Brazilia ĉefurbo, publikigis preskaŭ tutaĵan priesperantan raporton.

Evandro Avellar

NOREK: la jaro de astronomio

Perfekta septembra vetero benis la Esperanto-parolantojn, kiuj kunvenis en la urbeto Sidney sur la insulo Vankuvero (Kanado) por NOREK 2009 (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Kunveno). Ili venis de Kalgario, kelkaj lokoj en Brita Kolumbio kaj el diversaj partoj de la Usona ŝtato Vaŝingtonio.

Sekvante la temon de UN por 2009 (Internacia jaro de astronomio), la partoprenantoj dividis informojn pri nia universo. Ni lernis pri la origino de astronomio de Paul Hopkins, pri Marso de Ralph Gonyea, kaj pri la vivo de la astronomo Tycho Brahe de Olga DuTemple. Aliaj prezentoj temis pri NASK, pri *Eurotalk*, pri la lingva programo *Springboard to Languages* kaj pri festado de la 150a datreveno de Zamenhof. Unu ideo estas festi tiun gravan daton kaj samtempe la reaktivadon de la UEA-oficejo ĉe la UN-konstruaĵo en Novjorko per malferma akcepto en tiu impona loko. Wally DuTemple menciis, ke Esperantic Studies Foundation partoprenos en tiu projekto.

Bonŝance, la loka observatorio Herzberg Institute of Astrophysics (Instituto de Astrofiziko) festis la Jaron de astronomio per malferma tago. Ni vizitis la diversajn konstruaĵojn kaj informiĝis pri la plej lastaj paŝoj en tiu scienco. Je la fino de la oficiala programo okazis vizito al la Shaw Ocean Discovery Centre (Oceana Eltrova Centro) por spekti la lokajn maraĵojn.

Laŭ la kutimo de la NOREK, la venonta kunveno estos ie en nord-okcidenta Usono post unu jaro.

Ellen Eddy



Aŭtunaj Tagoj en Ursoburgo

Dum bela aŭtuna vetero semajnfine (19–20 sep) okazis la Aŭtunaj Tagoj de EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando) en la urbo Pori (svede Björneborg, esperantigite el tio: Ursoburgo).

Preskaŭ sesdek personoj sekvis la inviton, kaj surprize granda kvanto estis eksterfinnoj: de najbaraj landoj kiel Svedio, Ruslando, Estonio, aŭ Latvio, sed ankaŭ de Hispanio. Kelkaj el ili partoprenis en simpozia diskuto kaj prezento de, ekzemple, estiĝo de la latva aŭ estona nacioj. La finnlingvaj prelegoj de d-rino Anna Sivula (Universitata centro de Pori) kaj mag. Ilkka Koivusalo (de Rauma) kun traduko al Esperanto prilumis iom la historion de Finnlando kaj de la finna lingvo.

La ĉefa gasto estis hungaro István Móroc (vivanta en Zuriko), kiu antaŭ 50 jaroj venis al Finnlando por studi kaj poste instrui Esperanton en lernejo de

Harri Laine gvidas la aŭkcion en Ursoburgo. (Fotis Robert Bogenschneider)



Somero, sub gvido de la konataj aktivuloj Joel Vilkki kaj Jorma Ahomäki. Marjo Laine, lernantino el tiu tempo, havis la grandiozan ideon kunveni la tiaman klason kaj sukcesis per persista laboro trovi ĉiujn krom la mortintojn.

La historio de István interesis la regionan gazeton *Satakunnan Kansa*, kie aperis granda intervjuo kun foto; kaj en la retejo de la gazeto aperis okminuta video, kiu vive montras la Cseh-metodan instruadon kun la ĵurnalistino Elina Kemppainen kiel lernantino. En *Satakunnan Työ* aperis intervjuo kun la ruslanda gasto Valentin Seguru. Pliaj artikoloj dum la kvarsemajna vojaĝo de István tra Finnlando aperis en *Turun Sanomat* kaj en gazetoj de Somero kaj Kaarina.

Post la rakonto de István okazis aŭkcio, kiun gvidis “nia Tonkin” — Harri Laine. Posttagmeze la loka trajneto *Poritar* (Ursoburgano) dum rondveturo konatigis nin kun la urbo.

La enkonduko al Esperanto de Tuomo Grundström, anoncita de cirkulero al edukaj instancoj, logis preskaŭ du-dekon da urbanoj.

La Poria folkensemblo sub gvido de Risto Kupari vespere dancigis partoprenantojn, prezentiĝis konataj kantoj ankaŭ en Esperanta traduko de Tuomo.

La Tagojn partoprenis manpleno da FEJO-aktivuloj kaj hispana pasportservano, kiuj trovis spacon en la loĝejo de la lokanoj Paula kaj Robert. Estis tre agrable denove aŭ la unuan fojon renkontiĝi, dum bela aŭtuna vetero.

Restas al mi konstati, ke la Aŭtunaj Tagoj 2009 estis tre ĉarma kaj multe laŭdita kunveno.

Robert Bogenschneider

Du jardekoj da MontKabana vivo

La MontKabana Renkontiĝo festis ĉi-jare sian jubileon: 20 jaroj da senĉesa vivo, 20 septembraj semajnfinoj kun migradoj de esperantistoj-montaremuloj!

Ĉi-jara MKR okazis 17–20 sep en la kroata apudmara urbeto Starigrad, ĉe la konata nacia parko Paklenica. La parko enhavas parton de kalkŝtona montaro Velebit, riĉan je interesaj kalkŝtonaj pintoj, ĉarmaj valetoj kaj du profundaj kanjonoj: Velika kaj Mala Paklenica. La renkontiĝon partoprenis 36 personoj el ok landoj, do la internacia tradicio daŭre vivas — kvankam ĝi okazis dum la lastaj dek jaroj regule en Kroatio kaj Slovenio, “hejmuloj” neniam konsistigis eĉ la duonon de la partoprenantaro.

La programo tradicie konsistis ĉefe el migradoj. En la unua tago oni vizitis la menciitajn kanjonojn dividite en du grupoj, unu konsistanta el spertaj montmigrantoj, kaj la alia, kies membroj estis ĉefe infanoj kun gepatroj (kvinono da partoprenantoj estis infanoj). Dum la dua tago oni vizitis la pintaron Bojinac kie kalkŝtonaj rokoj miksiĝas kun trankvilaj valetoj kaj ofertas multegon da motivoj por esplorado, fotado kaj ĝuado en paco kaj freŝa aero kun rigardoj al marbordo kaj najbaraj adriatikaj insuloj.

Post migradoj la plej multo ĝuis la fakton ke la ejo troviĝis nur 20 metrojn for de la maro, kaj oni naĝis kaj sunumis. Kvankam la maro ne estis tiel agrable varma kiel dum somero, tio ne multe ĝenis kuraĝulojn.

Indas menci, ke ekde la venonta jaro MKR ŝanĝos sian organizmanieron. Dum la unuaj dek jaroj ĝi estis organizita en Aŭstrio de la Aŭstria Esperanto-Junularo (AEJ). Dum la dua jardeko ĝi estis gastigata en Kroatio kaj Slovenio kaj organizita de membroj de Kroata Junulara Esperanto-Asocio (KEJA). Nun venis tempo por ŝanĝoj. Laŭ la nova principo, MKR okazos ĉiujare en alia lando kun ĉeforganizantoj el tiu lando kaj kunorganizantoj el KEJA, kiuj daŭre helpas ĉe la organizado kaj subtenos la MKR-tradicion. Kvankam la detaloj ankoraŭ ne estas tutcertaj, venontjare ĝi okazos plej verŝajne en Aŭstrio.

Pli pri la ĉi-jara MKR (ĉi-jara raporto kun bildoj aperos rete novembro) kaj pri venontaj okazaĵoj legu je MKR-retpaĝo: <http://www.keja.hr/mkr.html>, kiu daŭre donos freŝajn informojn spite al ŝanĝoj en organizado.

Vanja Radovanović

Skota Studrondo 2009

En la Skota Esperanta Kalendaro estas tri ĉefaj okazaĵoj: la Skota Kongreso en la somero, la Studrondo en la aŭtuno, kaj la Zamenhofa Festo en decembro. La unuaj du havas pli longan historion ol la lasta.

La Studrondo, kiu okazis en Dunblane 3–4 okt 2009, laŭ onidiroj povas esti la lasta studrondo ĉe *Churches' House* (kunsidejo por anoj de diversaj Eklezioj) en Dunblane, beleta urbeto ne for de Stirlinga Kastelo, la iama loĝejo de Skotaj Reĝoj. La grumblado rilatas al la kunsidejo kaj ne al la Studrondo mem. Se ĝi ja estos la lasta, kia domaĝo! La loko mem estas favora al veturantoj de tri grandaj urboj kie troviĝas esperantaj grupoj.

Tiu ĉi Studrondo estis sukcesa, danke al la organizinto, Hju Reid. Pasintjare li persvadis d-ron John Wells, kaj ĉi-jare li kaptis alian grandan fiŝon, d-ron Paul Gubbins!

La Studrondon malfermis parolado de Paul Gubbins “Esperanto-teatro 100-jara”. Tiu temo estas aparte kara al li, ĉar li mem verkis plurajn dramojn. Ĉi tiu parolado estas la rezulto de originalaj esploroj dum multaj jaroj de du homoj — Paul mem kaj, antaŭ li, Marjorie Boulton. Samtempe kun la parolado de Paul, Hju Reid gvidis lecionon por progresantoj.

En la posttagmezo okazis ekskurso. Ĉi-jare la studrondanoj veturis aŭtobuse al Falkirk por viziti *Callendar House*, majesta domo kun ĝia bela, kaj bone konservata bieno.

Post la reveno al Dunblane ĉiuj partoprenis en diskuto pri la estonteco de la Studrondo kaj de la Esperanta Asocio de Skotlando. La kialo por tiu kunveno estas tio ke la malabundo de membroj en ambaŭ minacas ilian estontecon.

Kiel oni atendas ĉe renkontiĝo nomata “Studrondo”, la programo rekonis la fakton, ke la partoprenantoj falis en tri lingvajn kategoriojn: lernantoj, progresantoj, kaj progresintoj. Do post la vespermanĝo oni povis elekti inter du programeroj: por lernantoj, “Lingva Ekzerco” gvidata de Tom Neil, aŭ por progresintoj, “Verkista Angulo.”

La lasta programero de la unua tago estis kvizo de Duncan Thomson. La kerno de lia kvizo koncernis la difinadon de strangaj, neordinaraj Esperantaj vortoj. Tradicie, la plej babilemaj studrondanoj kolektiĝis post la lasta programero kaj pasigis la vesperon ĉe la apuda trinkejo. Tio estas neoficiala programero, kies

mankon oni sentos, se la Studrondo ne plu okazos ĉe Dunblane.

Dimanĉe matene la studrondo malfermiĝis per ilustrita parolado de Paul Gubbins. Paul rivelis al ni, ke lia alia pasio krom Esperanto estas miniaturaj fervojoj. Pere de bildoj projekciitaj sur ekrano, Paul kondukis nin tra ĉiuj etapoj en la disvolviĝo de *Mossley-Fervoĵeto* en sia malantaŭa ĝardeno. Post kafaŭzo la programon finis la leciono *Traduku* de Hju Reid.

Jack Casey

Triafoje en Zaozhuang

25–27 sep la ĉina urbo Zaozhuang gastigis la 3an Internacian Festivalon de Esperanto, en kiu partoprenis, krom ĉinoj, kvar francaj kaj kvin japanaj esperantistoj kaj pluraj subtenantoj de Esperanto, inkluzive de la prezidantoj de la Zaozhuang-a Universitato kaj de la Zaozhuang-a Profesia Universitato, kiuj planas enirigi Esperanton en siajn instruprogramojn. La prezidanto de UEA, d-ro Probal Dasgupta, kaj la urbestro, d-ro Chen Wei, sendis gratulajn mesaĝojn.

Profesoro Liu Xiaojun, la prezidanto de Shandong-a Esperanto-Asocio, prelegis pri Konfuceo, kaj Sun Mingiao pri ĉinaj proverboj. Hao Tao, fama fotisto kaj subtenanto de Esperanto, aranĝis sian propran fotoekspozicion. Oni interŝanĝis la teo-kulturojn de Japanio kaj Ĉinio. Hideko Hujimoto gvidis la japanan teo-prezentadon.

Semio

Nome de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĉina Radio Internacia kaj de lokaj Esperanto-asocioj oni metis florojn al la monumento de Zamenhof en la kultura placo en la urbo.



Unufraze

★ Reĝo de Norvegio Harald la 5a donis al la norvega E-aktivulo Elna Matland la Reĝan Arĝentan Medalon pro Merito pro aktivado en la norvega socio ĝenerale k precipe en la E-movado. (*Norvega Esperantisto*)

★ Sur la muro de la Ĝeneva domo en la strato Vieux-Collège 12 estas reinaŭgurita la memortabulo kun la teksto: “En tiu domo loĝis en 1905 L.L. Zamenhof, iniciatoro de la lingvo Esperanto”. (*Esperanto*)

★ 29 sep en la franca tagĵurnalo *Le Monde* aperis tutpaĝa anonco pri Eo pagita de Etsuo Miyoshi. (Esper-German)

★ Pli ol mil personoj vizitis la ekspozicion “Esperanto en Vraca pli ol cent-jara”, kiu unu monaton estis vizitebla en la regiona historia muzeo de Vraco, Bulgario. (HeKo)

★ Okaze de la 150-jariĝo de L.L. Zamenhof en la distrikta muzeo de la urbo Slatina (Rumanio) malfermiĝis ekspozicio pri Eo, kiu funkcios ĝis la jubileo de Zamenhof — 15 dec. (Marian Vochin)

★ Ekde septembro 2009 funkcias E-kurso en la Universitato de Alta Alzaco (Mulhouse, Francio) kadre de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj; ĝin gvidas Edmond Ludwig. (Landa Agado)

★ En la meksika urbo Guadalajara meze de septembro komenciĝis E-kurso en la Centro Universitario de Ciencias Exactas e Ingenierías ĉe la universitato Guadalajara sub la gvido de Katharine Brownshire kun ĉ. 30 studentoj. (Martin Schäffer)

★ Stokholma Universitato aprobis kursoplanon por plene distanca E-kurso bazita je <http://lernu.net>; ekde 2007 E-kursoj ĉe la universitato uzas *lernu!* en kombino kun klasika instruado, sed ekde la venonta jaro la instruado okazos nur per interreto k *lernu!*. (Sonja Petrović Lundberg)

★ Ángel Arquillos Lopez, prezidanto de Andaluzia E-Unuiĝo, publike ekŝigis el la estraro de Hispana E-Federacio k el la posteno de la redaktoro de la HEF-organo *Boletín* “pro akriĝanta tendenco al superregado fare de Madrido”. (HeKo)

★ La Plenumkomitato de SAT ekŝigis el la asocio k-dinon Etel Zavadlav sekve de propono de la Konflikto-komisiono de SAT. (*Sennaciulo*)




Malkovru Esperanton!

Malkovru Esperanton estas la titolo de nova, plenkolora, 24-paĝa broŝuro pri Esperanto en multaj lingvoj. La broŝuro estis kreita en internacia kunlaboro, kadre de E@I kaj ILEI, kaj celas prezenti nian internacian lingvon al homoj, kiuj eble ŝatus legi iom pli ol nur faldfolion, sed ankoraŭ ne pretas aĉeti libron pri Esperanto.

La broŝuro kun informoj kaj personaj rakontoj pri Esperanto enhavas jenajn 7 ĉapitrojn:

1. Bazaj informoj pri Esperanto
2. Lingva prezenteto de Esperanto
3. Personaj rakontetoj pri Esperanto
4. Zamenhof, iniciatinto de Esperanto
5. Esperanto el psikologia vidpunkto
6. Kutimaj demandoj pri Esperanto
7. Lokaj informoj pri Esperanto

Sub gvido de Hokan Lundberg naskiĝis utila informilo pri Esperanto, ĝian titolon proponis Enrique Ellemberg el Usono, aspektigis la broŝuron Stano Marček el Slovakio, redaktoro de la revuo *Esperanto*. Kontribuis per rakonto pri siaj Esperanto-spertoj 14 personoj el Azio, Afriko, Ameriko kaj Eŭropo, interalie, famaj esperantistoj kiel Katalin Kováts, Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy.



Pri la enhavo kaj la aspekto venis bonaj komentoj kaj konsiloj de multaj informemaj esperantistoj tutmonde. Kunordigis la laboron Hokan Lundberg kun subteno de Petro Baláž (kunordiganto de E@I) kaj Radojica Petrović (prezidinto kaj nun estrarano de ILEI).

Pluraj personoj pozitive komentis la broŝuron, interalie la prezidanto de EEU, Seán Ó Riain: “Mi elkore gratulas vin pro la belega kaj ege utila laboro. <...> La broŝuro estos ege utila en nia laboro ĉi tie en Bruselo kun la novelektita Eŭropa Parlamento, kie ni bezonas multajn lingvajn versiojn”.

La broŝuro estas jam presita en kvin lingvoj (Esperanto, slovakaj, sveda, pola, dana), de tio en la dana aperis la malpli longa, 12-paĝa versio. Krome ĝi jam estas tradukita al la itala, finna, angla, hungara, portugala, rusa, hispana. Kelkaj el tiuj lingvo-versioj aperos baldaŭ ankaŭ paperforme.

La hejmpaĝo de la broŝuro troveblas ĉe <http://ikso.net/eo/brosuro/> (En la retejo nun ankaŭ haveblas la ĝis nun presitaj broŝuroj en PDF-formato por elŝuto.)

Ĉiuj kiuj volas traduki (kaj provlegi) la broŝurtekstojn estas bonvenaj uzi la tradukejon de E@I. Klarigoj kiel uzi ĝin troviĝas ĉe la paĝo: <http://ikso.net/eo/brosuro/tradukoj/>.

Post fintraduko estas far grafikisto Stano Marček kreataj printeblaj versioj en diversaj lingvoj, kiuj estos aldonataj al la broŝuro-retejo. Tiun ĉiun laboron aranĝas E@I. Tamen la presadon prefere la Landaj Sekcioj mem prizorgu.

Ĉiuj komentoj kaj ŝanĝproponoj estas bonvenaj pri la broŝuro, kaj aspektaj kaj enhavaj, ĉar laŭplane post jaro aŭ du oni iom refaros/modifos la broŝuron laŭ komentoj kaj uzospertoj. Tiel la projekto iĝos viva, interaga kaj espereble pli kaj pli sukcesa.

Hokan Lundberg, Peter Baláž

Movado science esplorinda

La 4an de majo 2009 al la Ruslanda prezidento Dmitrij Medvedev estis sendita letero, kiun subskribis vicprezidanto de Rusia Esperantista Unio (REU) Nikolaj Gudskov kaj estrarano de REU Valentin Seguru-Zajcev.

Pretekste de la aktualigo de la koncepto de la ŝtata sekureco de Ruslando, ili atentigis pri la danĝera nivelo de la tutmondiĝo de la angla lingvo, kiu minacas la sekurecon de la neanglalingvaj landoj, inkluzive de Ruslando. La propagandon de la angla lingvo en Ruslando la aŭtoroj de la letero imputis al akademiano d-rino Irina Ĥalejeva — la rektoro de la Moskva Ŝtata Lingva Universitato kaj grava funkciulino en la kleriga ministerio. La letero proponis okazigi konsultiĝon de reprezentantoj de la Konsilio de Sekureco de Ruslando kaj de REU por ellabori konkretajn rekomendojn en tiu sfero.



Irina Ĥalejeva

La 15an de septembro REU ricevis respondon, kiun subskribis referendario I.Beljajev el la oficejo de la Konsilio de Sekureco. Li konstatis, ke la anglalingva minaco al la sekureco de Ruslando estas troigita, kaj jene skribis pri Esperanto:

Koncerne Esperanton, laŭ konkludo de scienca eksperti-zo, kiun, komisiite de la oficejo de la Konsilio de Sekureco de Ruslanda Federacio, faris fakuloj el la Ruslanda Akademio de Sciencoj, en internacia komunikado ĉeso de la uzado de la nacia lingvo avantaĝe al ĉi tiu artefarita lingvo estas interpretebla kiel libervola rezigno de unu el la signoj de la ŝtata suvereneco.

Aldone, laŭ opinio de fakuloj de la Ruslanda Akademio de Sciencoj, oni ne povas konsideri celkonforma devigan instruadon de Esperanto, ĉar: ĝi estas relative malmulte disvastiginta; ĝia rolo de interkultura komunikilo estas malgrava (sed lastatempe ĉi tiu aspekto, kaj ankaŭ la neceso propagandi la rusan lingvon kiel internacian komunikilon, ekhavas primaran signifon por la Ruslanda Federacio); enkonduko de plia studobjekto en la jam troŝarĝitajn altlernejajn programojn povos sekvigi negativan reagon de instruistoj kaj studentoj.

Tamen la supraj notoj ne malebligas fakultativan instruadon de Esperanto en mezlernejoj kaj altlernejoj. Pozitivan rilaton meritas ankaŭ la esperantista movado, kiu bezonas sciencon esploradon kiel originala socikultura fenomeno.

En la reta diskutado, kiu sekvis post la respondo de Beljajev, oni atentigis ke, kvankam la subskribintoj indikis siajn postenojn en la asocio, ĝi ne estas oficiala letero de REU, kiu ne komisiis al la du estraranoj skribi ĝin. Aktivuloj kulpigis la aŭtorojn pri la diletanteco kaj ridindeco de la letero al la Ruslanda ŝtatestro. Ĉi tio ne estas nur emocia reago: evidentigis, ke la du kunaŭtoroj eĉ ne sciis, ke Irina Ĥalejeva estas membro de la Scienca Konsilio ĉe la Konsilio de Sekureco de Ruslando, kaj ke la “lingva sekureco” de Ruslando logike devas esti ŝia tasko.

La respondo de la malgrava referendario ne fermas la pordon al la fakultativa instruado de Esperanto kaj rekonas la esperantistaron ... almenaŭ kiel esplorobjekton. Ĉu ni atendu etnografian ekspedicion, kiu science esploros nin?

AIKO

Bunteco bonas en Herzberg

Ekde la 17a de aŭgusto mi loĝas en Herzberg kaj laboras kiel volontulino en la Interkultura Centro Herzberg (ICH). Mi povas realigi miajn revojn, plibonigi Esperanto-lingvokonon, lerni la germanan lingvon kaj samtempe konatiĝi kun la funkciado de ICH danke al la projekto Grundtvig kadre de la programo “Dumviva Lernado”.

Ĉi tie mi preskaŭ ĉiutage travivas gravajn kaj ĝis nun nekonatajn sentojn, spertojn kaj mi deziras dividi ilin kun ĉiuj, kiuj ŝatus viziti ĉi tiun lokon, sperti ion nekutiman... Herzberg estas specifa loko en Esperantujo kaj pro tio mi provos ĉiumonate priskribi ion gravan, prezentante ĉion, kio kunligiĝas kun la urbo, Esperanto kaj ICH.

Al Herzberg mi unuafoje venis pasintjare, ĉeestante la aranĝon TORPEDO-4 (Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia). Mi tuj enamiĝis al ĉi tiu bela urbeto, urbeto fabeleca, kaj tiam mi deklaris, ke certe mi revenos ĉi tien. Jen, mi revenis, ĉeestante la majan Eŭropan Kongreson kaj nun realigante la Asistantecon de Grundtvig. El la lastaj eventoj mi elektis nur unu, ĉar al mi mankas tempo por priskribi ĉion kio okazas ĉi tie, kaj *La Ondo* bezonus kelkajn krompaĝojn por aperigi miajn detalajn raportojn!

La 25an de oktobro en la najbara urbo Osterode, en loka lernejo okazis aranĝo kadre de “Tag der Vielfalt” (Tago de Bunteco). Estis multaj informtabloj sed al mi tuj “okulfrapis” granda interesiĝo pri Esperanto precipe de junuloj. Min surprizis, kiom multaj homoj jam aŭdis pri Esperanto, Esperanto-projektoj kaj kiuj tuj kunligis la nomon Herzberg kun la Esperanto-urbo.

Lokaj esperantistoj disdonis Esperanto-informilojn, sed la ĉefan tonon donis Zsófia Kóródy, kiu ĉarme (ĉiam kun rideto) informis gepatrojn pri la Esperanto-kursoj, lerte ludis kun junuloj per speciale preparitaj bildkartoj “Diru Esperante” kie la ludanto devis nomi la desegnaĵojn per Esperanto-substantivoj. La junuloj rapide kaptis la logikan Esperanto-regulon kaj bonege amuziĝis, konkursis. Nia tablo estis dum la tuta renkontiĝo okupata ankaŭ de infanoj, kiuj diligente kaj kontente kolorigis la figurojn de knabo kaj knabino. La desegnaĵoj poste estis alpinglitaj al granda tabulo. Tio bone akordiĝis kun la ĉeftemo de la tago: *Bunteco bonas!*

Bela varbmetodo estis kantado de germana popolkanto en Esperanto fare de la grupo *Buntaj birdoj* (la koruseto konsistas el lokaj Esperantistoj kaj gastoj, geamikoj, kiuj kunlaboras kun ICH). Ĉiuj konstatis, ke Esperanto belsonas. Estis

La Esperanto-tablo en Osterode estis tre populara.



fruktodona tago, ĉar ankaŭ kelkaj eminentaj personoj pensas nun pri organizado de Esperanto-kursoj...

Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar eluzas ĉiun bonan okazon por varbado kaj por disvastigi Esperanton. Ĉi tie estas multe da laboro sed konstante mankas volontuloj...

Malgosia Komarnicka

Ne donu podion al kverelantoj

Ĉiam mi ĝojas, kiam alvenas via revuo kun tre ampleksa, tre interesa enhavo. Kun plezuro mi legas la historion pri Orienta Prusio, kiun vi kun larĝa historia scio reflektas.

Ĉi-jare ni sufiĉe ofte servis je niaj informtabuloj, sur kiuj neniam mankis via revuo, ĉar ĝi havas ĉarman, allogan, belan aspekton — bravo!

Mi nek scias nek konas tiun komitatanon Z, sed li kondukas/skribas ekzakte kiel tiuj klubanoj, kiuj neniam transprenas veran taskon sed konstante serĉadas iujn verajn aŭ imagitajn mankojn en movado, klubestraro ktp. Esperanto sendube nun travivas profundan krizon, sed antaŭ ĉiu fiplendado aŭ seriozaj analizoj niaj estraroj kaj medioj donu al la movado kuraĝigon. Ni eltenu ĉiun bonan kritikon, sed al kverelantoj ni ne donu podion.

Kun atento mi ĉiam legas informojn pri via urbo kaj regiono. La plej granda ĝojo estas, ke Pollando kaj Ĉeĥio devas rezigni pri la antiruslandaj raketoj, kiuj provokus la starigon de rusaj (atom)-raketoj en via regiono.

Werner Pfennig

Mirinde rapide

Hieraŭ mi trovis la oktobrean *Ondon* en mia leterkesto. Mirinde rapide mi ĝin ricevis kaj rapide mi ĝin jam plejparte legis. Ridigis min *Spritaj splitoj kaj preskeraroj*, pensige mi legis la poemojn, lertajn tradukojn de Valentin Melnikov; kaj digne mi legis la *Paĝojn de historio...*, valoran prelegeton de Halina. Interesa estis ankaŭ la intervjuo de Ela. Mi ĝojas, ke ŝi povas esti kontenta post kaj pro sia fervora kongreslaborado. La recenzon pri via nova libro mi jam antaŭe legis rete.

Bruno Lehtinen

Du proponoj el Ĉinio

ILEI-Ĉinio planas okazigi dek-tagan instruistan seminario en la urbo Taiyuan en julio aŭ aŭgusto 2010. La celo estas por altigi la nivelon de la ĉinaj Esperanto-instruistoj, trejni ilin, diskuti pri metodoj de instruado.

Por krei bonan Esperanto-etoson, ni volas varbi volontulojn el aliaj landoj. La volontuloj devas esti spertaj en instruado de Esperanto. Dum la restado en la seminario ili ne pagos la manĝaĵojn kaj la loĝadon, sed ili devos mem pagi la biletojn al kaj de Ĉinio. Ni povas aranĝi viziton de aliaj urboj.

arko.gong@qq.com

Ĉina Esperanto-Ligo serĉas alilandan eksperton (tradukisto/redaktoro) por labori dum 12 monatoj ĉe la reta revuo *El popola Ĉinio* (vidu: <http://www.espero.com.cn/index.htm>) en Pekino. La tasko estas traduki, kontroli kaj revizii artikolojn, babili kun junaj laborantoj, ĉeesti Esperanto-kunvenojn en aliaj urboj. Plej bone, la kandidato scipovu paroli la anglan lingvon.

wrzj@tom.com

Pri ĉi tiu dokumento

Verkante *Homaranon* mi laboris kun malnovaj libroj, gazetoj kaj arkivaj dokumentoj. Eble al niaj legantoj estus interese vidi, ekzemple, la abituriantan ateston de Zamenhof, kiu estas konservata en la Centra historia arkivo de Moskvo (CIAM), f. 418, op. 293, №188.

La dosiero entenas 14 (fakte 13, ĉar unu aperas kiel originalo kaj kiel kopio) dokumentojn de/pri Zamenhof kaj tri aldonajn dokumentojn, kiujn Aleksandr Saĥarov skribis en 1918, kiam li "malkovris" ĉi tiun arkivaĵon. Nikolaj Nekrasov tradukis ilin en Esperanton kaj publikigis en *La Nova Epoko* (1929, №3, p. 58–68). Liaj tradukoj estis kelkfoje represitaj, interalie, en PVZ. La faksimilo aperis en *Granda Galerio Zamenhofs* de Holzhaus (Helsinki, 1973, p. 70), sed ne tre bonkvalite.

Do, la 15an de junio 1879 Zamenhof ricevis abituriantan ateston №740, kiu tekstis, interalie:

Ĝi estas donita al Lazarj Zamenhof, de la Hebrea religio, filo de ŝtatoficisto, naskiĝinta en la urbo Bjalistoko de Grodna gubernio la 3an de decembro 1859, lerninta en la Bjalistoka Reala Gimnazio dum 3 jaroj, en la Varsovia 2a vira Gimnazio dum 5 jaroj kaj pasiginta unu jaron en la VIII klaso, pri tio, ke:

Unue, surbaze de la observado dum la tuta tempo de lia lernado en la Varsovia 2a vira gimnazio, lia konduto ĝenerale estis bonega, la reguleco en frekventado kaj preparado de la lecionoj, kaj ankaŭ en plenumado de la skribaj taskoj estis bonega kaj la scivolemo ĝenerale al ĉiuj studobjektoj kaj precipe al la Helena lingvo estis bonega, kaj due, ke li montris jenajn sciojn:

Sekvas notoj: en la unua kolumno tiuj de la Pedagogia Konsilantaro, en la dua — la ekzamennotoj.

Leĝo de Dio	—	—
Rusa lingvo kaj Literaturo	4 bone	4 bone
Logiko	4 bone	—
Latina lingvo	4 bone	4 bone
Helena lingvo	4 bone	5 bonege
Matematiko	4 bone	5 bonege
Fiziko kaj Matematika Geografio	4 bone	—
Konciza Naturscienco	—	—
Historio	4 bone	4 bone
Geografio	4 bone	—
Germana lingvo	5 bonege	—
Franca lingvo	5 bonege	—

Konsiderinte la konstante bonegajn konduton kaj diligentecon kaj la bonegajn sukcesojn en la sciencoj, precipe en la Helena lingvo, la Pedagogia Konsilantaro decidis premii lin per arĝenta medalo kaj doni al li la Ateston, kiu donas ĉiujn rajtojn, listigitajn en §§129–132 de la Statuto de gimnazioj kaj progimnazioj, konfirmita de la Imperiestro la 30an de julio 1871.

Varsovio, la 15an de junio 1879.

En 1879 la arĝentajn medalojn en la gimnazio ricevis nur du abiturientoj: Ludovik Jakobson kaj Lazarj Zamenhof. Legu pli en *Homarano*.

Aleksander Korĵenkov

La abiturianta atesto de Lazarj Zamenhof



АТТЕСТАТЪ ЗРѢЛОСТИ.

№ 740

Данъ сей Лазарю Заменгофу вѣроисповѣданія Еврейскаго
сыну Уиновича, родившемуся въ с. Бѣлостокѣ Гродненской Губерніи 3^{го} Декабря 1859^{го} года
 обучавшемуся въ Бѣлостокской Реальной Гимназіи 3 года, въ Варшавской 2^{ой} мужской Гимназіи 5 летъ
 и пробывшему одинъ годъ въ VIII классѣ, въ томъ:

Во первыхъ, что на основаніи наблюденій за все время обученія его въ Варшавской 2-ой мужской гимназіи, поведеніе его вообще было отличное, исправность въ посѣщеніи и приготовленіи уроковъ, а также въ исполненіи письменныхъ работъ отличная прилежаніе отличное и любознательность ко всемъ вообще предметамъ и особенно греческому языку отличная и во вторыхъ, что онъ обнаружилъ нижеслѣдующія познанія:

	Отмѣтки выставленныя въ Педагогическомъ Совѣтѣ на основаніи § 45 правилъ	На испытаніи, происходившемъ <u>7, 14, 15, 16, 17, 28 и 30 Мая, а также 1, 4 и 7 Июня 1879 года</u>
въ Законѣ Божіемъ		
„ Русскомъ языкѣ и Словесности	<u>4 хорошо</u>	<u>4 хорошо</u>
„ Логикѣ	<u>4 хорошо</u>	
„ Латинскомъ языкѣ	<u>4 хорошо</u>	<u>4 хорошо</u>
„ Греческомъ языкѣ	<u>4 хорошо</u>	<u>5 отлично</u>
„ Математикѣ	<u>4 хорошо</u>	<u>5 отлично</u>
„ Физикѣ и Математической Географіи	<u>4 хорошо</u>	
„ Краткомъ Естествовѣдѣніи		
„ Исторіи	<u>4 хорошо</u>	<u>4 хорошо</u>
„ Географіи	<u>4 хорошо</u>	
„ Нѣмецкомъ языкѣ	<u>5 отлично</u>	
„ Французскомъ языкѣ	<u>5 отлично</u>	

Во вниманіе къ постоянно отличному поведенію и прилежанію и къ отличнымъ успѣхамъ въ наукахъ въ особенности же въ греческомъ языкѣ Педагогическій Совѣтъ постановилъ наградить его серебряною медалью и выдать ему АТТЕСТАТЪ, предоставляющій всѣ права, обозначенныя въ §§ 129—132 ВЫСОЧАЙШЕ утвержденного 30 Іюля 1871 года Устава гимназій и прогимназій.

г. Варшава Іюня 15 дня 1879 года.



ДИРЕКТОРЪ
Статскій Советникъ А. Смирновъ

Преподаватель и. д. Инспектора В. Марауцъ

Секретарь Совѣта З. Милинъ

УЧИТЕЛИ: А. Бутковичъ, В. Билевичъ, Н. Карловичъ,
А. Уиновичъ, С. Олонецъ, Шендеръ,
А. Дубинскій, С. Олонецъ, И. Яковлевъ,
А. Дубинскій, В. Марауцъ, Н. Карловичъ

Въ типографіи Варшавскаго Учебнаго Оупута.



Bezono kaj neceso de Zamenhof-Bibliografio

de Reinhard Haupenthal

En sia tri-parta artikolo *Aktualaj problemoj de Zamenhofologio*¹ (mi preferus paroli pri taskoj), Aleksander Korĵenkov kvazaŭ pretere diras: “Fine, estas apenaŭ kredeble kaj preskaŭ skandale, ke ĝis nun ne estas eldonita scienca bibliografio de la verkoj de Zamenhof kaj de la zamenhofologiaj verkoj.” (I, p. 19)

Evidente, Korĵenkov parolas pri la t. n. primara kaj sekundara literaturo. En ambaŭ kazoj oni povas distingi inter monografia kaj perioda literatura. Se temas pri monografioj *pri* Zamenhof (t. e. biografioj, prilingvaj studoj ktp.), ili estas relative malabundaj kaj facile kompileblaj. Ia-sence tio validas ankaŭ por la kontribuoj de Zamenhof al periodaĵoj: ilin registris Wüster (*Zamenhof-Radikaro*), Dietterle (*Originala Verkararo*) kaj poste Itô en sia PVZ-serio.

La kerno de la problemo kuŝas sur du aliaj kampoj:

1. la monografia verkaro de Zamenhof

2. la kaŝita literaturo *pri* Zamenhof (kaŝita en la Esperanta gazetaro, ofte malfacile alirebla, kaj en kolektivaj verkoj).

La studoj de Holzhaus kaj Maimon plejparte eniris la librojn de tiuj aŭtoroj, sed la fekunda verkado de Golden pri la temo Zamenhof ankoraŭ atendas sisteman registradon kaj klasadon. Estus saĝe, se malgranda teamo dividus inter si la laboron kaj sisteme registrus la artikolojn aperintajn en la tuta gazetaro de Esperanto (kaj ankaŭ ekster ĝi). Nur tiel povas komponiĝi kompleta mozaiko. La registrado plej facile ordiĝus laŭaŭtoro kaj kronologie. Sed necesus gvidiloj tra la labirinto kiuj sistemigus la materialon laŭ difinitaj kriterioj: lokoj kie Zamenhof vivis, etapoj en lia vivo, personoj lin kontaktintaj, lingvaj aspektoj ktp.

Apenaŭ antaŭtakseblas la amplekso de ĉi laboro kaj la bezonata tempo. Sekve unue necesas kompili liston de la konsultotaj revuoj kaj konstati, kiu(j) biblioteko(j) aŭ/kaj individuoj disponas kompletajn jar-kolektojn, poste iu(j) devas trafolii, registri trovaĵojn (laŭ striktaj bibliografiaj normoj) kaj fari anotaciojn² laŭ ŝlosil-vortoj. Por ke zamenhofologio estu scienca, ne sufiĉas nomi ĝin tia... En la fino de tia laboro oni povus apartigi la grenon disde la ventumaĵo kaj kolekti la grenon en unu-du volumojn...

Malpli timiga estas la kompilo de ĉiuj verkoj de Zamenhof, inkluzive de ties eldonoj, represoj kaj eventualaj tradukoj. Laŭ mia provizora takso temas eble pri milo da titoloj. La tuto klasif-eblas jene:

1. Verk-eldonoj (OV, PVZ...)
2. Paroladoj (opaj, kolektoj)
3. Traktaĵoj
4. Leteroj (opaj, kolektoj)
5. Hilelismo, homaranismo
6. Lerno-libroj, lingvaj respondoj
7. Vortaroj
8. La Fundamento
9. Proverbaro Esperanta
10. Fundamenta Krestomatio
11. Tradukoj (angla, dana, franca, germana, hebrea, jidiŝa, pola, rusa)

La ĉefaj kriterioj validaj por tia bibliografio devas esti la jenaj:

– *sistemeco*: nura kronologia listo kiel kutime en personaj bibliografioj (ekz. en fest-libroj) ne havas sencon pro la komplekseco kaj daŭra reeldonado de la Zamenhofa verkaro;

– *kompleteco, kompletigeblo*: temus ne pri selekta bibliografio, sed pri laŭebla registrado de ĉio (sendepende de la lingvo): la skemo permesus ĝisdatigon;

– *ekzakteco*: strikta apliko de bibliografiaj normoj kaj nepra aŭtopσιο³ (*veni, vidi, vici...*);

– *dokumentiteco*: necesos indiki almenaŭ unu trov-lokon en publika biblioteko, unua-vice IEMW. La virtuala katalogo de Karlsruhe permesas, en kazo de manko en Vieno, ali-lokan situon de verko. Movadajn bibliotekojn (Aalen, BEA, JEI, UEA...) oni konsideru nur, se alia troveblo ne ekzistas.

La sumo de tiu bibliografio povus esti malŝlosita divers-kategorie: laŭ editoroj kaj eldonistoj (oni ne forgesu, ke ĝis nun neniu entreprenis bibliografion de ĉiuj *Hachette*-eldonoj, nek de *Literatura Mondo* ktp.), laŭ aper-lokoj kaj -jaroj kun simplaj resendoj al la ĉefa parto kaj ties numer-sistemo.

Pro miaj mult-jaraj spertoj en bibliografiaj laboroj (ĵus aperis mia kompleta Waringhien-bibliografio⁴, bibliografioj pri Kalocsay kaj Schleyer estas slipare finitaj) unu-flanke kaj ali-flanke pro la fakto, ke la leonan parton de la Zamenhofaj verkoj mi posedas, mi intencas akcepti la defion kaj ataki la laboron. Eble en 2017, okaze de la cent-jara datreveno de la morto de Zamenhof, Korĵenkov povos proklami, ke la Esperantomovado havas unu skandalon malpli.

Notoj

1. *La Ondo de Esperanto*, 2009, №2, p. 18–19; №3, p. 12; №4, p. 12–13.

2. **anotacio**. Komenta noto pri bibliografia registraĵo *D* Annotation, *F* annotation.

3. **aŭtopσιο**. Ekzamenado per propra-okula kontrolo.

4. Haupenthal R. *Gaston Waringhien (1901–1991). Bibliografio de liaj publikigaĵoj*. [Bad Bellingen]: Edition Iltis, 2009. 57 p.

Esperantujo ekfestas la Zamenhofan jubileon!

Mondcivitano de unua rango

Sub la patronado de la pola ĝenerala konsulino por Bavario kaj Baden-Virtembergio, Elżbieta Sobótka, la Esperanto-Klubo de Munkeno kaj la Bavara Esperanto-Ligo organizis kulture festaranĝon en la Kulturcentro Gasteig en Munkeno. Pli ol 140 partoprenantoj (duone neesperantistoj) unue aŭskultis la salutvortojn de Sobótka kaj de Fritz Hilpert, la prezidento de la Munkena Esperanto-Klubo. Poste Michael Scherm prelegis pri “Dr. Zamenhof — mond-civitano de unua rango”.

Michael Scherm, kiu tradukis germanen *La Zamenhof-straton* de Roman Dobrzyński, honoris la tutvivan verkon de Zamenhof, do ne nur la kreadon de Esperanto, sed ankaŭ la fondon de mond-civitana kultureco. Bernd Krause, la prezidento de BELO, emfazis ke la lingvo estas ne nur taŭga, sed ankaŭ rapide ellernebla, kiel li mem spertis.

Por demonstri la belecon kaj la riĉecon de la lingvo la japana virinĥoro *Hana* (vd. sur la suba foto) kantis ses kantojn. Frieder Weigold ne nur tradukis tiujn kantojn, sed ankaŭ la sekvontan bluzon *Vojo 66*, kiun prezentis la pola kantistino Agnieszka Hekiert kun la ensemblo de Leszek Źądło. Je la fino ĉiu partoprenanto ricevis la ŝancon elprovi la lingvon per kuna kantado de la Esperanta versio de la Eŭropa himno.

En la enirejo de la koncertsalono la munkenanoj instalas informtablon kaj, interalie, disdonis esperantlingvan materialon pri Bjalistoko kaj Pollando, kiun al ni sendis samideanoj el la naskiĝurbo de Zamenhof. Post unu semajno ni ofertis informvesperon pri Esperanto en la pollanda kulturcentro en Munkeno.

Karl Breuninger



De Zamenhof ĝis la Manifesto

Itala Esperanto-Federacio ĵus eldonis itallingvan verkon de prof. Carlo Minnaja *Le grandi personalità dell'Unesco: Lazzaro Ludovico Zamenhof*. Temas pri 300-paĝa antologio, kun du enkondukaj eseoj, trideko da tekstoj (inkluzive ĉiujn festparoladojn), kvin poeziaĵoj, plus apendice la manifestoj de Prago kaj de Raŭmo.

Kunlaboris Davide Astori, Elvia Belluco, Giuseppe Castelli, Giordano Formizzi, Silvia Garnerio, Federico Gobbo, Michela Lipari kaj Giorgio Silfer. Teknika redakto de Michela Lipari kaj Riccardo Natale Pinori.

La zamenhofologia novaĵo estas tre digna kontribuo okaze de la jubilea Zamenhof-jaro.

HeKo

La vicurbestro de Bjalistoko en Berlino

La vicurbestro de Bjalistoko kaj LKK-estro de la Bjalistoka UK, Aleksander Sosna, 28 aŭg venis al Berlino por konatiĝi kun la nova Zamenhofparko. Post la rigardado de la parko kaj de la apuda Esperanto-domo sekvis vizito ĉe la distriktestrino de Berlin-Lichtenberg, kune kun reprezentantoj de Germana Esperanto-Asocio, Esperanto-Ligo Berlin kaj TEJO.

Dum la renkontiĝo montriĝis preteco subteni la agadon de esperantistoj en la distrikto per enkonduko de Esperanto al la programo de la distrikta Popola Altlernejo. Alia rezulto estas perspektivo de ĝemela rilato inter Berlin-Lichtenberg kaj Bjalistoko. Post la vizito la Esperanto-Ligo Berlin ricevis mondonacon de la distrikto pro la laboro pri Zamenhofparko.

Sekvis vizito en la ĉefa urbodomo de Berlino, kie okazis rigardo de salono, kie antaŭ 101 jaroj Zamenhof faris prelegon, kaj enskribiĝo en la gastlibro.

Post tagmanĝo sekvis aŭdienco ĉe la pollanda ambasadoro, d-ro Marek Prawda. Dum la aŭdienco la ambasadoro estis informita pri la Bjalistoka UK kaj pri la okazigo de “Centra jubilea german-pola Zamenhoffesto” (18 dec 2009). D-ro Prawda akceptis esti patrono de la Zamenhoffesto.

Johano Pachter

Spiritistoj omaĝis Zamenhofon

La 8a Spiritista Esperantista Renkontiĝo (SER) okazis 13 sep 2009 en Braziljo kun 96 ĉeestantoj. Elmir Santos Lima dum unu horo parolis pri la ĉefa temo: “150 jaroj de la naskiĝo de Zamenhof” kaj poste dum dudek minutoj respondis demandojn de la ĉeestantoj.

Sekvis arta programo. Grupo *Printempo* kantis kelkajn popolkantojn nacie kaj Esperante. La infana Esperanto-Grupo *Porto Carreiro Neto* prezentis dulingve la skeĉon *Leno kaj Lilian* de la brazila verkisto Jair Salles. Walter Fontes deklamis portugale la poemon *Esperanto*, kiu estis medieme ricevita de Castro Alves per la mediumo Chico Xavier kaj *Ho, mia kor’* de Zamenhof. Kvin lernantoj de EG *Lazaro Luiz Zamenhof* prezentis la ĉefskeĉon *La lingvo kiu venis el ĉielo* de Floriano Borba.

En paŭzo per la kanto *Gratulon* ĉiuj gratulis okaze de la arĝenta jubileo la grupon *Zamenhof*, kiu estis fondita en 1984, kaj manĝis tre bongustan kukon kun refreŝigaĵoj.

Fine ĉiuj kunkantis *La Esperon*.

Paulo Kverko

En la naskiĝurbo de Zamenhof

En la centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko oktobre komenciĝis laborrenkontoj dediĉitaj al Esperanto. Ili celas popularigadon de la lingvo Esperanto, de la persono kaj ideoj de Ludoviko Zamenhof, kaj informadon pri la historio kaj nuntempo de la Esperanto-movado en Bjalistoko, Pollando kaj la mondo.

La serio daŭros duonjaron. La renkontiĝoj okazos unufoje semajne en la Zamenhof-Centro (strato Warszawska 19). Gvidas ilin Przemysław Wierzbowski, kaj ĉiun renkontiĝon komencos prelego de historiistoj, pedagogoj kaj specialistoj pri Esperanto-movado.

LukiZ



Pejzaĝoj de senhejmeco

Ekzistas nur unu literatura premio, pri kiu oni parolas mondvaste — kaj tiu estas (eble bedaŭrinde) la Nobelpremio. Se la Sveda Akademio atribuas ĝin al verkisto, kies krea pinto estis jam antaŭ pluraj jardekoj (Lessing, Pinter, Le Clézio), tiam ni prave demandas: kial ĝuste tiu kaj kial nur nun? Se la Akademio elektas premiiton, kiu skribas politike en korekta maniero, sed literature apenaŭ kun talento (Jelinek), tiam ni ankaŭ demandas: ĉu vere necesis?

Sub la antaŭa tro skandala sekretario, estis pli da maltrafaj ol kompreneblaj decidoj¹. Nun estas finfine nova sekretario, sed la Akademio ankoraŭ kapablas surprizi nin. La plej granda surprizo estas, ke ĉi-jare ili trovis almenaŭ aktivan verkiston. La literatura Nobelpremio al Herta Müller dudek jarojn post la falo de la Muro estas ne nur saĝa kaj politika, sed ankaŭ trafa kaj digna decido. Müller donis voĉon al tiuj sen voĉoj, la sennomaj, senhejmigitaj viktimoj de la komunistaj diktaturoj.

Herta kiu²?

Tiel demandis usona revuo. Iuj asertas, ke Müller estis nur konata de etaj intelektaj klikoj, sed tiu kritiko maltrafas la celon, ĉar plej grave devus esti premii kvaliton kaj ne famon. Kaj prave, Müller ne kondukas kiel literatura stelaro. Modeste kaj iom timeme ŝi renkontas siajn legantojn. (Kaj hodiaŭ, la 14an de oktobro jam venas indiko, ke la kermeso de la lasta semajno jam estas tro por ŝi.) Pli gravas la kritiko, ke la premion ricevas por la tria fojo en unu jardeko germanlingva verkisto. Por eviti, ke la plej prestiĝa monda literaturpremio fariĝu interna pure Eŭropa afero, ĝi iru en la sekvonta jaro nepre al lando ekster Eŭropo.

Estis ankaŭ aliaj komentoj. Ekzemple, en la pola gazeto *Rzeczpospolita*³ iu supozis, ke tiu premio ankaŭ estas laŭdo por la germana revenĝismo. Tiel Masłoń transiras la limon al persekuta manio, kiel pli frue en la plej groteska periodo de la fratoj Lolek kaj Bolek. Feliĉe pli prudentaj polaj komentariistoj ne primitive mezuris laŭ pollanda interna politiko. Kaj kial verki pri germanoj en stalinismaj koncentroj estas revenĝismo?

Herta Müller naskiĝis en 1953 en Rumanio, en la regiono Banato. La germana estas la lingvo de la hejmo kaj de la regiono. La rumanan ŝi lernas en la aĝo de 15 jaroj. Tio estis por ŝi la lingvo de la diktatoro Ceaușescu. Aŭtune tiu kvazaŭ ordonis al la naturo, ke ĝi floru, kaj por obei oni ŝprucis verdan farbon al la flaviĝintaj folioj. Poste Müller skribis, ke ŝi pro tio jam ekmalamis la naturon. Tamen la unika forto de la poezia lingvo estas, diras la fakuloj, ke ŝi kombinas la germanan tra rumana medio.

Herta Müller laboris kiel tradukisto en fabriko, sed estis maldungita, ĉar ŝi rifuzis kunlabori kun la sekreta polico, la

Securitate. Ŝia unua libro *Nadiroj* temis pri la vivo en Banata vilaĝo. Ĝi aperis en Rumanio en cenzurita versio en 1982 kaj komplete en okcidenta Germanio. Parto de la vilaĝa loĝantaro tute ne ŝatis la draste senromantikan priskribon de ilia vivo.

La dua libro *Prema Tango* aperis ankaŭ en Rumanio en 1984. La aŭtoritatoj tiam permesis al ŝi prezenti la libron en okcidenta Germanio, kompreneble Müller estis sub forta observado de la sekreta polico kaj ties lokaj spionoj. Post la reveno, oficiro de Securitate pridemandis ŝin kaj miris, kial ŝi revenis el Germanio. Tiam Müller montris al portreto de la diktatoro kaj diris, ke tiu iru sed ne la popolo. Pli ol 20 jarojn poste Müller rakontis por la unua fojo pri la psika teroro de la komunistaj sbiroj.⁴

La sekreta servo venis kaj iris laŭplaĉe, kiam ni ne estis hejme. Ofte ili intence postlasis signojn, cigared-restaĵojn, transprenis bildojn de la muro kaj metis ilin sur la liton, rearanĝis seĝojn. La plej horora daŭris kelkajn semajnojn. De vulpofelo sur la planko ili fortranĉis iom post iom la voston, la piedojn, la kapon kaj metis sur la ventron de la vulpo. Oni ne vidis la tranĉojn. Dum purigado mi rimarkis por la unua fojo la fortranĉitan voston. Tiam mi ankoraŭ pensis pri hazardo. Kiam post kelkaj semajnoj la malantaŭa piedo estis fortranĉita, mi ektimegis. Ĝis kiam ankaŭ la kapo estis fortranĉita, mi unue kontrolis la vulpofelon kiam mi revenis al la hejmo. Ĉio povis okazi, la loĝejo perdis sian privatecon. Kiam mi manĝis, mi pensis ĉiam, ke la manĝo eble estas venenita.

En 1987 la situacio tamen iĝis neeltenebla — ŝi forlasis Rumanion kune kun la edzo Richard Wagner. Ŝi vivas nun en Berlino.

Ŝia plej aktuala libro, *Spirbalancilo*, temas pri deportitoj al sovetia koncentrejo. La bazo estas konversacioj kun la amiko Oskar Pastior. Müller intime kaj ame trovas esprimojn por malsato, morto, suferoj — ĉio, kio hantas homojn dum tiu senhomigo en koncentrejo.

Ni legu la komencon de la libro (en la apuda paĝo)...

Wolfgang Kirschstein

Notoj

1. <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/170-lode.htm#170-07>.
2. <http://shelf-life.ew.com/2009/10/08/herta-muller-nobel-literature>.
3. http://www.rp.pl/artykul/9148,374988_Maslon_Dwa_oblicza_nagrody.html. Germanlingva resumo: <http://www.das-polen-magazin.de/2009/10/editorial-herta-mueller-und-die-rzeczpospolita>.
4. <http://www.zeit.de/2009/31/Securitate>



Pri pakado de kofro (el "Spirbalancilo")

de Herta Müller

Ĉion, kion mi posedas, mi portas ĉe mi.
Aŭ ĉiajn miaĵojn mi portas kun mi.
Mi portis ĉion, kion mi havis. Tio ne estis de mi. Ĝi estis necelkonforma aŭ de iu alia. La kofro el porka ledo estis gramofonskatoleto. La kontraŭpolva mantelo estis de la patro. La urba mantelo kun la velura strio ĉe la kolo de la avo. La pufa pantalono de mia onklo Edwin. La ledaj volvogamaŝoj de la najbaro, sinjoro Karp. La verdaj lanaj gantoj de mia onklino Fini. Nur la vinruĝa silka ŝalo kaj la necesujo estis miaj, donacoj de la lasta kristnasko.

Ankoraŭ estis milito en januaro 1945. Pro la timo, ke mi meze en la vintro devis iri al la rusoj neniŭsciis-kien, ĉiu volis doni ion al mi, ion eble utilan, se ne serveman. Ĉiu donis ion al mi kaj pensis ion pri mi mem, ĉar mi estis neŝanĝebla sur la listo de la rusoj. Kaj mi prenis ĉion kaj pensis, ke tiu forveturo en la aĝo de dek sep jaroj okazis en la ĝusta tempo. Ne estus bezonata la listo de la rusoj, sed se ne fariĝos tro aĉa, eble estos eĉ bona por mi.

Mi volis iri for el tiu fingroĉapeleto de eta urbo, kie la ŝtonoj havis okulojn. Anstataŭ timo mi havis tiun prisilentitan senpaciencon. Kaj malbonan konsciencon, ĉar la listo, pri kiu malesperis miaj familianoj, estis akceptebla stato por mi. Ili timis, ke io okazos al mi en la fremda lando. Mi volis iri al loko, kiu ne konis min.

Io jam estis okazinta al mi. Io malpermesita. Estis io stranga, malpura, senpudora kaj bela. Tio okazis en la alnopenko tute malproksime, trans la monteto. De la vojo hejmen mi eniris en la centro de la parko la rondan pavilonon, tie kie dum festotagoj ludis la orkestroj. Mi sidis tie dum iom da tempo. La lumo pikis tra la fajne ĉizelita ligno. Mi vidis la timon de la vakaj cirkloj, kvadratoj kaj trapezoj, interligita per blankaj ĉiroy kun ungoj. Tio estis la desegnaĵo de mia devojiĝo kaj la desegnaĵo en la vizaĝo de mia patrino. En tiu pavilono mi ĵuris al mi mem: neniam plu mi revenos en ĉi tiun parkon.

Tradukis el la germana lingvo
Wolfgang Kirschstein

Valora skatolo

Ĉeliauskas, Petras. *El mia Esperanta skatolo: Kolekto de tradukoj kaj artikoloj pri esperantologiaj kaj litovaj temoj.* — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009. — 520 p.; 500 ekz.

La pli ol 500-paĝa volumo omaĝas la 80-jaran jubileon de Petras Ĉeliauskas, eminenta litova esperantisto. Kiel dekjarulo li eksciis pri Esperanto el porinfana revueto, sed li lernis ĝin nur en 1957 kaj ekde tiam partoprenas en la Esperantomovado.

Ĉeliauskas multe tradukas el la litova lingvo. Lia unua traduko aperinta libroforme estas poemo *Homo* de la renoma litova poeto Eduardas Mieželaitis, kiun aperigis ŝtata eldonejo en 1986 en la nun nekredebla eldonkvanto 6000 ekzempleroj! La libron ornamas belaj lignogravuraĵoj.


Alia grava traduko atendis sian aperigon preskaŭ du jardekojn. Temas pri verko escepte grava por la litovaj lingvo kaj literaturo. En 1859 episkopo kaj poeto Antanas Baranauskas verkis la poemon *Arbaro de Anykščiai* por montri riĉecon de la litova lingvo. Ankaŭ por Ĉeliauskas estis defio pruvi per sia traduko la riĉecon de Esperanto. La libro aperis en 2003 kun belaj ilustraĵoj de Vladimiras Beresniovas.

Entute, Ĉeliauskas esperantigis preskaŭ sesdekon da litovlingvaj poeziaĵoj de 24 poetoj, ankaŭ versaĵojn de belorusaj poetoj, fragmentojn el poemoj *Konrad Wallenrod* de Mickiewicz kaj *Kavaliro en tigra felo* de Rustaveli. En la volumo oni trovas unusolan tradukon el la rusa lingvo — de la konata *Konkluda versaĵo* de Sergej Jesenin, kies pli trafa traduko estas konata. Eble la traduko de Ĉeliauskas estis farita helpe de la litova traduko? Li tradukis ankaŭ kantotekstojn. Inter la prozaj tradukoj estas rakontoj, fabeloj kaj teatraĵoj. Sur tricento da paĝoj de la recenzata libro oni povas konatiĝi kun la traduka laboro de la jubileulo.

Regula preleganto en Baltiaj Esperanto-Tagoj, li publikigis multajn artikolojn en *Litova Stelo* pri esperantologio, historio de Esperanto en Litovio, ankaŭ pri la litovaj lingvo, literaturo, kulturo kaj historio, en kiuj estas sentebla tipe baltlanda vidpunkto al la historio.

Ekde 1995, dum 11 jaroj Petras Ĉeliauskas redaktis la asocian organon *Litova Stelo*, ankaŭ ĉiutagajn gazetojn en BEToj kaj SAT-kongreso, kiuj okazis en Litovio. Li verkis litovlingvan libron *Nuo Babelio iki Esperanto* pri la mondlingva problemoj kaj kompilis *Bibliografion de Litoviaj Esperanteldonaĵoj. 1890–2006*. Bedaŭrinde, mankas en la nun prezentata volumo lia propra kompleta bibliografio, kvankam multaj indikoj troviĝas en la librofina biografia skizo.

Kvankam *El mia Esperanta skatolo* prezentas siaspecan rezulton de lia multjara aktivado, ni scias, ke Petras Ĉeliauskas daŭrigas sian verkadon kaj tradukadon. Ni deziras al li ĝian realigon per novaj libroj.



Halina Gorecka



Rivelita, rivelota, rivelinda

Couperus, Louis. *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj: Rakontoj / Trad. el la ned. Gerrit Berveling. — Rotterdam: UEA, 2008. — 183 p.*

Aŭtente, mi pli bone konceptas la veran signifon de Esperanto, kiam mi legas tradukaĵon el periferio de la monda literaturo.

Vole-nevole mia atentado, kiel la atentado de ĉiu averaĝa leganto, tradukisto, eldonisto, estas centrita sur la grupo de grandaj lingvoj: la angla, la hispana, la franca... kies aŭtoroj havas certan privilegion, samkiel — en la populara muziko — tiuj, kiuj kantas anglalingve havigas al si, almenaŭ teorie, maksimuman aŭskultantaron. Tiu malekvilibro estas neevitebla malbono ne facile kuracebla. Ni vidas do, ke Esperanto povas esti sukcesa kuracilo, kaj kutime veas pri ĝia tro modesta (ja per la fakto de ĝiaj fizikaj kapabloj del momento) praktika aplikado.

Ĉi-foje traduko rivelis al mi ĝis nun nekonatan nederlandanon, kiu skribis antaŭ jarcento kaj estis sukcesa verkisto, tamen, ve, sur la limigita areo de sia



nacia kulturo. Libro de noveloj kun galanta, se ne korteza, titolo estis promesanta kion ajn, sed plej verŝajne — aron de bagateloj. Tiel mi pensis ĝin prenante kaj, bonfortune, eraris.

Ĉar Louis Couperus vere estas klasikulo kaj en tiu kvalito li estas persono de universala — tuttera — dimensio. Favo- re al mia bona fortuna Couperus, kiu iĝis konata antaŭ ĉio per siaj romanoj,

posedis raran flekseblecon stilistan. Tio permesis al la tradukinto prezenti lin sufiĉe riĉe en malgranda libro entenanta dekon da noveloj. Sufiĉe — por senti la talenton kaj ekmemori la nomon; kaj tre nesufiĉe — por kontentiĝi per la amplekso de la legitaĵo. Sed la nomo sonis, kaj en la unua bonŝanco al ĝi mi revenos.

Por diri pli ĝuste, mi volus pli bone koncepti la aŭtoran personecon, esprimi- tan tiel strange, tiel varie kaj kalejdosko- pe en la bildoj de la novelaro.

Dek historioj montras plej diversajn tipojn en diversaj epokoj — del antikv- eco ĝis la nuntempo. Gladiatoro, vaga- bondoj, maljuna templa virgulino, duk- ino, etburĝino, turisto, anĝelo, dio... La plumo aŭtora laboras plej diversstile, iam — iom seke, skize li priskribas la situon, sed pli ofte oni eniras densan, intensan verkan substancon, kiel, ekzemple en *Morto de Vesta* aŭ en *Lukrezia*. En tiuj, plej ampleksaj, noveloj la kondensitaj imagelementoj de la verko formas kvazaŭ fizikan preskaŭ materian plenecon de la reprezento, kreante luci- dan multekoloran palpeblan realecon.

La galerio de tipoj, kreita de la fanta- zio de Couperus inkludas verajn heroojn (Vesta), ordinarajn karakterojn (Lukrezia), ekstravaganculojn (turisto) ktp ĝis estaĵoj de eksternatura deveno (Dio Jizo). Sed, ŝajne, estas io komuna en ĉiuj, iu filozofio, iu vivostilo, iu mondo- koncepto, kiu esprimiĝas fakte kaj akte, kaj, iufoje en aŭtora teksto aŭ en dialo- go: “nur paŝadi tiel kiel ŝi devas” (*Lukrezia*), “ree ekfari la agon, por kiu vi estas naskita” (*La amara filozofo*). Ĉu tio estas certa fatalismo, ĉu stoika firme- co kun pure homa elemento, tion mi eble ekkonos leginte iun romanon de Coupe- rus.

La traduko de Gerrit Berveling ŝajnas al mi tre bona, precipe tiuj speci- alaj neregulaĵoj, kiuj imitas certan refe- rencan sintakson. Evidente, la tradukinto sekvis la konsilon de Dio Jizo:

Sed niajn agojn simple ni faru laŭ nia konvinkiĝo kiel plej bone fari ilin.

Laŭ mia percepto, la pasintecaj par- toj de la novelaro estas preferindaj por atenta lego. Antaŭ konsenti aŭ malkon- senti vi bezonas do gustumi la libron.

Alen Kris

Zamenhofologia monatofino en KĈE

La Esperanto-Domo en Ĉaŭdefono gastigos 30–31 jan 2010 la Ruslan- dan ĵurnaliston Aleksander Korĵenkov el Kaliningrado.

Aleksander Korĵenkov, ĉefredaktoro de *La Ondo de Esperanto*, estos la ĉefa preleganto en la Kultura Monatofino dediĉita al la temo “Inter hagiografio kaj historiografio: ĉu eblas sincera biografio de Zamenhof?”.

Korĵenkov parolos unue pri la “Aktualaj problemoj kaj taskoj de zamenhofo- logio” kaj poste prezentos du prelegojn “La patro kaj la filo” (kun tute novaj informoj pri Marko Zamenhof, aperontaj unue en la decembra *Ondo*) kaj “Zamenhof en Grodno”.

La eminenta zamenhofologo Korĵenkov, aŭtoro de la biografio *Homarano*, prelegos sabaton la 30an; la postan tagon intervenos mag. Francisko Degoul, prezidanto de Scienca Instituto Zamenhof, kaj prof. Giorgio Silfer.

Degoul prelegos pri “Subjektivaj kaj objektivaj aspektoj de sincereco en la biografioj de Zamenhof”, kun precipe la ekzemploj de Privat (sincereco kun hagiografia emo) kaj Korĵenkov (sincereco kun historiografia emo), fronte al la jud-kaŝemaj biografioj, kun tamen aldono de filozofiaj demandoj pri la signifo de la vorto “sincereco”, pri la rilatoj inter sincereco kaj objektiva vero, kaj pri la ĉiam relativa nivelo de sincereco kaj historia vero.

Silfer intervenos pri “La diferencigaj elementoj inter raŭmisma kaj finvenk- isma interpretoj pri la vivo de Zamenhof”, kun respondoj precipe al similaj demandoj: Zamenhof la hebreo: ĝis kiam kaj kiom? Kial iu letero pli gravus ol alia? Homaranismo: kiom kaj kiel prezenteblo? ktp. Ne temos pri specifa atribuo de aŭtenteco aŭ praveco, sed pri la enfokusigo de la apogpunktoj por la diverĝaj interpretoj.

✉ Postiers 27, CH-2301 La Chauz-de-Fonds

☎ (41)32-9267407

✉ kce@esperantio.net

Ne forgesu
(re)aboni

Ideoj, kiuj eble provokos...

Nemere, István. *Serpentoj en la puto*: Originala romano. — Kalinin-grad: Sezonoj, 2009. — 184 p.; 400 ekz.

La eventoj de la plej nova romano de István Nemere povus okazi en ajna urbo en la nuna Eŭropo. En tiu Urbo loĝas Omar. Omar venas el alia, fora lando kaj, pli grave, el kulturo, kie despotas religio kaj tradicio. Malrapide li tamen al kutimiĝas al la libera vivo en la Urbo.

Iomete li sentis, ke li venkis la Urbon. Li ne povus rakonti precize, kiel tio okazis, aŭ ĉu tio vere okazis — sed tion li sentis. Kompreneble, verdire li batalis kontraŭ siaj propraj timoj en la lasta jaro. Estis longa epoko, la plej longa en lia vivo. Nun li komencas la duan studjaron en la universitato, sed tiun unuan li neniam forgesos (p. 7).*

Omar komencas senti la tenton de la libera vivo. Li ankaŭ ekperdas la kateĵojn de la opresa religio. Ĝuste tio estas minaco por la lokaj gvidantoj de tiu religio. Tial ili deklaras la liberan vivon devojigo de la ĝusta ortodoksa vivmaniero. Imamo Ibrahim deklaras, ke la bonstato estas tento de satano por forlasi la vojon de Alaho. Ibrahim agrese kaj malame rilatas al la socio de la “nekredantoj”. Senprobleme li trovas pravigon eĉ por teroristaj agoj en sia sankta libro: “Mortigu ilin, kie ajn vi trovos ilin” (p. 127 kaj 4:90 en la traduko de Chiussi).

Terorismo kaj la kulto de morto kaj detruo estas ĝuste la temo de *Serpentoj en la puto*. Vivi volis ankaŭ la knabo Tarik, kiun la mistera Abu Mussa logis al la Urbo per promesoj. Tarik tamen eksplodigis sin kontraŭ sia volo kaj scio, perfidita de Abu Mussa. La ideoj de Abu Mussa estas pura stalinismo en religia vestaĵo.

Kiamaniere reagu la socio al tiu minaco? Plej urĝe estas, ke la kontraŭterorisma polico ne nur malhelpu la krimon, sed ankaŭ defendu la bazon de nia libereco. En la Urbo ili estas en la Verda Fortikaĵo. Ili faras la praktikan laboron, kaj sekvi ĝin en si mem jam estas sufiĉe interesokapta legaĵo. Mi ne malkaŝu tro da detaloj de tiu intrigo, mi

* Ankaŭ <http://esperanto.org/Ondo/Beletro/Nemere1.htm>. Laŭdinda estas la Kaliningrada eldonejo *Sezonoj*, kiu malavare publikigis la unuajn ĉapitrojn en la reto.



nur menciu, ke ĉiam estas novaj turniĝoj kaj novaj aspektoj.

Kontraŭbatali terorismon havas ankaŭ ideologian flankon, ĉar teroristoj estas krimuloj kun ideologio. Kiel reagi al la ideologia aspekto de la defio. Nemere prezentas kelkajn poziciojn.

Ĉu fermi sin (kaj niajn sociojn) kaj vivi aparte, kiel sugestas iu populista aktorino? Tio estas apenaŭ daŭra solvo.

Spertulino pri kontraŭterorismo tial enkondukas la bildon pri la serpentoj en la puto.

Legantoj, kiuj ŝatas politikan korektecon, verŝajne ne ŝatos la komparon; sed, se ni forprenas la retorikon, postrestas la prudenta konkludo: endas forpreni de la teroristoj la ideologian venenon. Kaj niaj socioj restu sur la vojo de la moderna vivo.

Nia vojo estas la vojo de natura evoluo, kiu kondukas al la tutmondiĝo, al la unuiĝo, por povi kune solvi niajn problemojn (p. 71).

La ideologio de multkulturismo tute ne aperas en la libro de Nemere — al mi ĝi ne mankis, ĉar mi opinias, ke ĝi estas sterila kaj nefekunda, sed ties anoj probable malŝatos la romanon *Serpentoj en la puto* pro tio.

La kontraŭo al la kulto de morto estas celebri la vivon.

En *Serpentoj en la puto* tio estas la romantikaj rilatoj inter Omar kaj Isabel. Trans la ideologioj, trans la kulturoj ili renkontiĝis sur komuna homa fundamento. Ni esperu, ke ilia amo estu sufiĉe forta por forigi la serpentojn el la puto.

En *Serpentoj en la puto* vi renkontos ideojn, kiuj eble provokos vin, sed la spirhaltiga komploto vin tute regalos. Bona, bela libro — rekomendinda por ĉiuj, kiuj havas opinion pri kiamaniere ni vivu en moderna socio.

Wolfgang Kirschstein

Beletra Almanako (BA)

estas literatura periodaĵo, lanĉita en septembro 2007,
kun 140 ĝis 176 paĝoj.



Ĝi aperas trifoje jare, en februaro, junio kaj oktobro.

Ĝin eldonas Ulrich Becker (Mondial, Novjorko) kaj redaktas Jorge Camacho (ĉefred.), Probal Daŝgupto kaj István Ertl.

BA enhavas diversajn rubrikojn, nome pri poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, teatro ktp, originale kaj traduke. Laŭ interkonsento kun UEA, ĝi publikigas la verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj.

Mendu unuopajn kajerojn ĉe UEA aŭ multaj retaj librovendejoj, aŭ abonu rekte ĉe

www.beletraalmanako.com

Literatura Foiro


Tre malofte, ankaŭ en grava kaj antikva kulturlingvo, kultura revuo atingas la 40an jarkolekton, tute sen paŭzo en la eldonritmo. En esperanto tio estas la kazo nur de *Literatura Foiro*, fondita en junio 1970 kaj de tiam aperanta ĉiun duan monaton, kun escepta ĉiumonat-eco dum la jubilea jaro 1987.

Same kiel *Literatura Mondo* havis sian modelon en la hungara *Nyugat* (Okcidento), LF inspiris sin al la itala *La fiera letteraria*, kies nomon ĝi simple tradukis. Dum la unuaj jaroj LF celis esti la organo de rondo el literaturistoj esperantlingvaj, sed kun komuna itallingva fono: *La Patrolo*, kiu en sia stabila teamo konsistis el Giorgio Silfer, Carlo Minnaja, Nicolino Rossi (san-marinano), Clelia Conterno, Gaudenzio Pisoni, Gianluigi Gimelli, Tazio Carlevaro (sviso el Tiĉino). La literatura rondo kaj ĝia revuo propulis la esperanto-kulturon en Italio, en pluraj kampoj.

Iniciatinto de *La Patrolo* kaj unua redaktoro de LF estas Giorgio Silfer, la plej grava personeco en la grupo. La transnaciigo de LF pasas tra lia propra vivo: kiam li migras al Finnlando, la revuo (kiu intertempe transprenis ankaŭ la rolon de *Norda Prismo*, ĉesinta en 1974) aperas ne plu en Milano, sed en la fora nordo, en Savonio: 1976–1978. Kaj ankaŭ en la tiea komunumo ĝi lasas influan spuron. La tria periodo de LF, inaŭgurita en 1978 ankoraŭ sub la ĉefredakto de Silfer kaj la plua ekzisto de *La Patrolo* (1969–1979), koincidas kun la migro de Silfer al Svislando. Tie, en Ĉaŭdefono, la 30an de majo 1980 dekvino da personoj (patrolanoj kaj ne italaj kunlaborantoj de LF, ekzemple la grava finna agento Irma Heikkilä) fondas Kooperativon de Literatura Foiro (LF-koop), kies organo ĝis nun LF estas. Por la okazo, Giorgio Silfer lasas la stirilon de la redakcio, kiun ĝis 1995 ĉefredaktos Perla Martinelli, kaj ekde 1996 Ljubomir Trifonĉovski. Hodiaŭ LF estas presata en Bulgario, ĝia redaktado okazas diverslande kaj ĝi fariĝis ankaŭ la organo de Esperanta PEN-Centro.

Literatura Foiro estas kvazaŭ 360-grada belvidejo al la esperanto-kulturo. Se komence la panorama lorno situis ĉe la itala angulo, kaj dua stativo estis lokita al la nordo, ekde la 1980aj LF komencas apliki raŭmismen en sia

kulturpolitiko, kio perfekte kongruos kun la idealoj en la Ĉarto de PEN-Klubo. Tie esperanto estas akceptita kiel literatura lingvo en septembro 1993, danke al la klopodoj de la homoj ĉirkaŭ LF: unuavice Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, sed ankaŭ István Nemere, Tazio Carlevaro, Gaston Waringhien. De tiu belvidejo la rigardo atingas trans beletro la kampojn de (plan)lingvistiko (interalie kun eminentaj kontribuoj de István Szerdahelyi), de historio kaj sociologio (kun la kontribuoj de la raŭma generacio, unuavice Jerzy Leyk, Jouko Lindstedt, Sándor Révész, Balázs Wacha, Walter Zelazny, plus Giorgio Silfer), de teatro, muziko kaj kino.



Startante el neniam dementita itala radiko, *Literatura Foiro* sukcesis tra la jaroj arigi ĉirkaŭ si la grandan plejmulton de la esperanta inteligencio, kaj certe la plej eminentajn, eĉ se inter si konfliktajn, kiel Szerdahelyi kaj Waringhien.

Lingve, LF alprenis klaran pozicion kontraŭ la malaj ekstremismoj de la “praga skolo” kaj la “bona lingvo”: kaj fakte nek Karolo Piĉ kaj Fernando de Diego, nek Claude Piron kaj Corsetti-Löwenstein estis inter ĝiaj aŭtoroj, sendepende de la tamen pozitivaj interpersonaj rilatoj, speciale kun Claude Piron. Socie, LF klare sin esprimis por la raŭmismo en Esperantio: kaj fakte la antiraŭmismoj, kiuj negas la efektivan ekziston de aŭtenta esperanto-kulturo, senkompromise asertatan jam de William Auld, ne situas inter ĝiaj kunlaborantoj. Politike, LF klare subtenas la batalojn de PEN Internacia, inkluzive de tiu pri la lingvaj rajtoj.

Jam de la unua itala periodo

(1970–1975) estas rimarkindaj kaj la strebo al aktualeco kaj la atento pri moderna grafiko. Krome necesas menciigi la oftajn kontaktojn kun verkistoj ne esperantlingvaj (tiam preskaŭ nur italoj, poste el la tuta mondo), el kiuj ĝermos tre bonaj rilatoj kun la itala intelektularo dum la sekvaj jardekoj (ekzemple kun Umberto Eco kaj Mario Luzi, ambaŭ kandidatoj por la literatura Nobelo).

En la finna periodo (1976–1978) en LF rimarkeblas la konkludo de la polemiko pri “la bros-problemo”, inter Kálmán Kalocsay kaj István Szerdahelyi pri la gramatika kategorieco de la radikoj, kaj la apogo al la kanzonistoj el la magia jaro 1977 (Gianfranco Molle, Olivier Tzaut, Johán Valano): pri la du lastaj ludas rolon ankaŭ la prestiĝo de la premio *La Verko de la Jaro*, iniciatita ĝuste de LF tiuepoke. Interesa en tiuj jaroj estas ankaŭ la kunlaboro kun la redakcio de *Kontakto*.

En la unua svisa periodo (1978–1984) maturiĝas la kresko de la revuo al tuta eldonejo. Unu el ĝiaj efikoj estas la portempa transdono de la interlingvistikaj paĝoj al la nova revuo *Planlingvistiko*, eldonita de LF-koop inter 1982 kaj 1986, sub la redaktado de Jouko Lindstedt (1982–1983) kaj poste György Nanovfszky.

Dum la ĉefredaktado de Perla Martinelli, LF atingas sian apogeon grafike kaj enhave, ankaŭ danke al la evoluo de la teknologio. Strategie tiam ĝi forte subtenas la sendependajn kulturcentrojn (LF-koop mem iniciatas unu el ili, La Kvinpetalon en 1985), kaj des pli intense la muzikan kulturon kaj la parolan kulturon.

La transnacieco de la revuo, kun ĉefaj alkroĉaj punktoj kaj okcidente (Italio, Svislando, Francio) kaj oriente (Hungario, Bulgario) kaj en Skandinavio, firmiĝas sub la ĉefredaktado de Ljubomir Trifonĉovski. Samtempe la enhavon eĉ pli influas la rilato kun la verkistoj de PEN-Klubo Internacia. Rimarkinda estas la kresko de atento pri teatro kaj kino.

Konklude, konstanta karakterizo de LF estas ĝia elasta kongruo al tuta, multifaceta kultura cirkvito, kiu fine de la 1990aj trovas sistemecon en la Pakto por la Esperanta Civito. Enirinte sian kvinan jardekon, *Literatura Foiro* daŭre estas en la fokuso de la esperanto-kulturo, atestante ankaŭ (sed ne precipe) per siaj polemikoj, ke “alia Esperantio eblas”.

Stella Meester



Literatura konkurso Liro 2009

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2009*. Ĉi-jare la organizanto proponas tri originalajn branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio

3. **Recenzo** de la romano *Serpentoj en la puto* de István Nemere (Kaliningrado: Sezonoj, 2009).

En la 1a kaj 2a branĉoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la 3a branĉo — nur per unu verko.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2009.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj retmesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2012 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Bjalistoko: Turisma informilo / Tradukis el la pola Barbara Pietrzak. — Białystok: Bjalistoka Esperanto-Societo, 2009. — 56 p., il. — [Donaco de Aleksander Korĵenkov].

Couperus, Louis. *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj*: Rakontoj / Tradukis el la nederlanda, enkondukis Gerrit Berveling. — Rotterdam: UEA, 2008. — 183 p. — [Recenzoekzemplero].

Čeliauskas, Petras. *El mia Esperanta skatolo*: Kolekto de tradukoj kaj artikoloj pri esperantologiaj kaj litovaj temoj. — Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009. — 520 p.; 500 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Esperanta-pola konciza frazaro / Kompilis Wiola Misiarek, Andrzej Zejdlar. — Białystok: Bjalistoka Esperanto-Societo, 2009. — 8 p. — [Donaco de Aleksander Korĵenkov].

Klag, Walter. *Hospitalo sepetaĝa*: Koŝmara novelo originale verkita en Esperanto uzante novelon de Dino Buzzati. Vieno: Klag, 2009. 92 p., il. — [Donaco de Walter Klag].

Kongresa libro: 94a Universala Kongreso de Esperanto. Bjalistoko, 25 julio – 1 aŭgusto 2009 / Redaktis Clay Magalhães. — Rotterdam: UEA, 2009. — 144 p., il. — [Donaco de Aleksander Korĵenkov].

Nemere, István. *Serpentoj en la puto*: Originala romano. — Kaliningrado: Sezonoj, 2009. — 184 p., 400 ekz. — [Donaco de Sezonoj].

Ricevitaj gazetoj

Dia Regno, 2009/3; EAB Update, 2009/47; Esperanto aktuell, 2009/4; Esperanto en Danio, 2009/4, Speciala numero; Esperanto sub la Suda Kruco, 2009/99; Esperanto, 2009/10; Femina, 2009/19; Frateco, 2009/85; Heroldo de Esperanto, 2009/9,10,11; Informilo por Interlingvistoj, 2009/3; Internaciisto, 2009/3; KAE-Informilo, 2009/68; La Brita Esperantisto, 2009/967; La Ondo de Esperanto, 2009/10; La Revuo Orienta, 2009/8-9; La SAGO, 2009/57; Monato, 2009/10; Norvega Esperantisto, 2009/4; Scienco kaj Kulturo, 2009/4,5; Sennaciulo,

120 mil artikoloj en Esperanto

15 okt 2009 la [Esperanto-vikipedio](#) atingis 120 mil artikolojn. Nia vikipedio nun tenas laŭ la nombro de artikoloj la 21an lokon inter la diverslingvaj versioj; la volapukan version oni preterpasis antaŭ kelkaj semajnoj (22 sep 2009). La 120.000a artikolo temas pri São Bento do Trairí, eta urbo en norda Brazilo.

La Esperanto-vikipedio ricevas tage ĉ. 160 mil vizitojn de homoj (do sen robotoj). Per tio la Esperanto-vikipedio en aŭgusto tenis la 33an lokon — iom post la greka kaj slovaka, iom antaŭ la litova kaj serba versioj de vikipedio.

La Esperanto-vikipedio havas plur-oblan utilon por la Esperanto-komunumo. Unue ĝi servas kiel leksikono — fakte la unua ĝenerala leksikono en la 122-jara historio de Esperantujo. Due ĝi per tio subtenas ankaŭ la terminologian diskutadon kaj laboron. Trie nia vikipedio tre klare montras al la ekstera mondo, ke Esperanto vivas ĉiutage kaj daŭre estas uzata. La lingvo Esperanto, antaŭ 122 jaroj la plej malgranda lingvo de la mondo, intertempe havas firman lokon inter la 50 plej gravaj lingvoj. Tio videblas krom per vikipedio ankaŭ per pluraj aliaj statistikoj kaj per la uzado en multlingvaj retejoj.

Por subteni la pluan konstruadon de la vikipedio mi alvokas ĉiun lingve spertan Esperanto-parolanton kontribui al vikipedio ĉiumonate almenaŭ per eta aldon. Egalas, ĉu tio estas korekteto de artikolo aŭ redaktado, tradukado el alia vikipedio aŭ verkado de komplete nova artikolo. Ĉiu kontribuo helpas daŭrigi la gravan taskon — supozeble temas pri la plej granda verkada tasko en la historio de Esperantujo.

Lu Wunsch-Rolshoven

[EsperantoLand](#)

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la tasko *Araneajo* el la aŭgusta-septembra *Ondo* venis 28 respondoj — plej multe dum la jaro. Ĉiuj respondoj estas tute ĝustaj! Ilin sendis Andrej Kirienko (Bjelorusio), Brian Bishop, Charles Dornan, Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio), Jindřich Tomášek (Ĉeĥio), Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen, Aira kaj Erkki Röntynen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Lucien Giloteaux (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Mario Szilveszter Machlik (Norvegio), Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Janina Dega, Antoni Gradek, Mirosława Kubicka, Stanisław Płachta, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski, Przemysław Wierzbowski (Pollando), Klara Iljutoviĉ, Nikolaj Penĉukov, Vjaĉeslav Rojdestvenskij (Ruslando), Valentina Ĵorĉević, Mihailo Nešić (Serbio), Kenĉjo Goldbergo (Usono). La loto donis libropremion al **Kenĉjo Goldbergo**. Ni gratulas lin!

La ĝusta respondo estas: *Brava homo en sia domo*.

Malnovaj taskoj

Ni proponas al via atento faskon da taskoj, publikigitaj en *La Ondo de Esperanto* antaŭ preskaŭ cent jaroj.

Divenu ŝaradon

S Go Go Go

Kvarliteraĵoj


Kun *b* mi estas Dia donaco, kun *k* — kreskaĵo, kun *p* — fervoro, kun *r* — korpa parto, kun *v* — ago.

Gloro viro

En ĉiu vorto ŝanĝu unu literon tiamaniere, ke per la anstataŭontaj literoj formu nomon de l' glora viro: *Fono, muro, kono, paco, maro, moro, pinto, lama*.

Magia figuro

Rearanĝu la literojn tiel, ke horizontale kaj vertikale ili formu la samajn vortojn.



Silaboj

Trovu tri duliterajn silabojn, tiel, ke: 1+2 donu spicaĵon; 3+3 kortbirdon; 3+2 korpoparton. Kion donos 1+3 kaj 2+3?

Divenu metion

Per translokigo de literoj sur la vizitkarto de s-ro D.E.Stinov, ni ricevas lian metion. Kio ĝi estas?

D.E. Stinov

La respondoj devos atingi la redakcion poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de decembro 2009.

Ĉu vi kaj via klubo prepariĝas al la 15a de decembro 2009?

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

TEJO sen patrina lakto

[En] la filmjurnalo UEA viva <...> <o>ni vidas sinprezenton de la nova Estraro de la junulara sekcio de UEA en la ĵusa ARKONES en Poznano, Pollando. (Gazetaraj Komunikoj de UEA, №342, 6 okt 2009, <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=342>; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

Frizvoja terminaro

<...> hararo de forveturantaj vagonaroj <...> hararo de alveturantaj vagonaroj <...> ĝenerala hararo (*Malgranda pola-Esperanta kaj Esperanta-pola fervojista vortaro*. Bydgoszcz: PEA, 1978, p. 5; malkovris Katarzyna Marciniak)

La celon ni plenumas

La niveloj de la lingvoekzameno: <...> C1 (supera nicelo, "aŭtonomeco" laŭ la Eŭropa Referenckadro). (*Regularo por ORIGO-sistemaj Esperanto-ekzamenoj*, 2 dec 2008, <http://www.itk.hu/data/files/urlap/regularo.pdf>)

Interpunkcio rangas ALTE

Asocio por LingvoTestistoj en Eŭropo <...> faros la punkton pri la situacio kaj per internaj resursoj kaj per eksteraj gastoj. (*Esperanto ĉe ALTE-laborgrupoj* // HeKo, №403 5-B, 17 sep 2009, <http://www.esperantio.net/index.php?id=990>)

Veraj nobakotinoj

ni havas retadresojn <...> de lernintoj. Ni regule informas ilin pri okazaĵoj de Esperantujo. (Ferenc Harnyos, <http://groups.yahoo.com/group/informado/message/1452>, 27 sep 2009)

Antaŭmorta membro

Antaŭ sia morto li iĝis membro de la Akademio... malgraŭ la pli fruaj konfliktoj pri la radik-karaktero... (I[ona] K[outny]. *Szerdahelyi — ankaŭ nun valida* // *La Ondo de Esperanto*, 2009, №10, p. 11)

Antaŭduonmorta stilero

Ne uzi [la vorton] *unu* kiel duonfinilon en Esperanto fariĝis stildisinga [tiele — I.E.] elemento. (Blazio Vaha, <http://groups.yahoo.com/group/AdE-diskuto/message/9377>, 9 sep 2009)

Ĉu katoj aŭ ratoj?

La Lisbona Traktato devas esti ratifita kaj aplikota kun granda efiko kaj plejeble baldaŭ. (J-K Rinaldo, <http://groups.yahoo.com/group/EU-konstitucio/message/1402>, 17 mar 2009)

Senbride pri Hebridoj

la <...> insulo Ailsa Craig <...> apenaŭ pli ol alta roko <...> situas <...> okcidente de <...> Skotlando. En iu antikva verko pri la hibrida insularo, la aŭtoro inkludis la rokon kiel laplej sudan insulon de tiu arkipelago. (Garvan Makaj: Pli pri la mistera insulo, *Monato*, №8-9, p. 31; <http://www.esperanto.be/fel/publika/009797p.php?p>; rimarkis Hèctor Alòs i Font)

Plukis István Ertl

Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugallio: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd


Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Meksiko. Neil Blonstein (konstanta reprezentanto de UEA ĉe UN), Martha Cardenas, Mallely Martinez Mateos, Daniel Moreno, Martin Schäffer kaj David Lopez Rueda kiel delegacio de UEA en la Konferenco de Neregistraj Organizaĵoj (vd. p. 3) informis pri Esperanto al centoj da aktivuloj. (Martin Schäffer)



Ĉeĥio. La programo de la ekoturisma renkontiĝo Ekotur (vd. la oktobran *Ondon*, p. 9) enhavis ekskurson en la urbo Litomyšl, kiun Karolo Piĉ eternigis en Esperantujo per sia romano *Lito-miŝla tombejo*. La ekoturanoj vizitis la tombejon kaj la tombon de Karolo Piĉ mem. (Petro Chrdle)



Tajvano. En la sud-tajvana urbo Pingtung funkcias masaĝ-kliniko kies estro, Kevin Shih kaj du aliaj klinikaj laborantoj (el la dek entute) estas esperantistoj. La masaĝejo funkcias ĉiutage de la tagmezo ĝis la noktomezo kaj enhavas la ŝildon ankaŭ en Esperanto. (Reza Kheirkhah)



JORGE LUIS BORGES
La sekreta miraklo

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne

Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj


Londono
 - 2 okt. merkredo, 8:45 vespero
 Parizo
 - 3 okt. ĵaŭdo, 7:20 mateno -
 - 3 okt. ĵaŭdo, 8:45 mateno
 Brindizio
 - 5 okt. sabato, 4:00 vespero -
 - 5 okt. sabato, 5:00 vespero
 Suez
 - 8 okt. merkredo, 11:00 mateno

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15
 208 paĝoj, 20 eŭroj



István Nemere
**Serpentoj
 en la puto**

István Nemere. *Serpentoj en la puto*
 Originala romano pri terorismo
 184 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon

**Maigret
 eraras**

Serio "Mondliteraturo", No 17

Georges Simenon. *Maigret eraras*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 17
 128 paĝoj, 12 eŭroj.